Driemaandelijks tijdschrift — Afgiftekantoor: Antwerpen X
Jarkolekto 18 — Trimonata

4/89

INTERNACIA PEDAGOGIA REVUO

Organo de Internacia Ligo de Esperantistaj Instruistoj ILEI

Redaktisto: István Ertl

REDAKTA KOMITATO

Carlevaro, T. (CH)
Formizzi, G. (I)
Lins, U. (D)
Ludwig, E. (F)
Maitzen, M. (A)
Mallia, C. (M)
Mizuno, Y. (J)
Szerdahelyi I. (H)

Respondeca eldonanto (verantw. uitgever): E. Symoens, Putsesteenweg 131 A, B-2180 Kalmthout

IPR

Redaktejo: Esperanto-fako, Universitato ELTE/BTK
H-1364 Budapest, Pf. 107
☎ + 36-1-1180-966/185

Presado: Grafika Centro Antverpeno,
Flandra Esperanto-Ligo, Frankrijklei 140,
B-2000 Antwerpen, ☎ +32-3-234 34 00

Enhavo

SYMOENS, Edward, Tria Azia Konferenco de Esperanto-instruado 1
Fondaĵo Szerdahelyi: lanĉa alvoko 10
GACOND, Claude, Necesas fortigi la osmozon! (Intervjuo) 12
MERLA, Maria, La plej facila lingvo – malfacile lernebla 16
KOUTNY, Ilona, Internacia koresponda fako lanĉita (Universitato Eötvös) 23
SMIDÉLIUSZ, Katalin, Kritika analizo de logika lernoludo 25
TANGERUD, Odd, Interesa frazo en la traduko de Zamenhof 29
ERTL, István, Recenzo *Interlinguistics* (red. K. Schubert/D. Maxwell) . . 30
Informoj, notoj, novaĵoj, alvokoj 33
ILEI labortable 36

ESTRARO DE LA LIGO

Prezidanto : Edward Symoens, Putsesteenweg 131/A, B-2180 Heide (Kalmthout); tel. (03)666.62.66 — Kunordigado, informado en pedagogiaj medioj, rilatoj kun Unesko kaj UEA.

Vicprezidanto : Stefan MacGill, Zsókavár ut. 46 IX 36, H-1157 Budapest; tel. (1) 1832-207 — Internaciaj ekzamenoj kaj iliaj kursoj, statistikado de instruado, internaciaj lerniloj, lerneja projekto, IPR.

Ĝen. Sekretario : Audrey Childs-Mee, Postbus 25041, NL-3001 HA Rotterdam; tel. (010)425.4625 — Rilatoj kun sekcioj, membroj kaj kun UEA. Internaciaj korespondaj kursoj. Pedagogia prizorgo de infanaj kongresetoj de UEA (Provizore la vicsekretario traktas la laboron).

Kasisto : Bertil Andreasson, Södra Rörum pl. 455, S-24294 Hörby; tel. (0415)-501 52 — Financaj rilatoj kun sekcioj, konferenco, k.a.

Vicsekretario : Malcolm Jones, 41 Causeway, GB-SN 15 3DD Chippenham; tel. (0249) 656041 — Venonta konferenco, lernejana korespondado, unuecigo de naciaj ekzamen-sistemoj.

Membroj : Till Dahlenburg, Str. der DSF 13, DDR-2722 Brüel; tel. (09-8576)-528 — Gvido de pedagogia komisiono, internaciaj ekzamenoj, metodikaj kursoj.

Zang Danchen, Gong Wai Xi, Shifan Daxue, Wuhan, Huazhong, Ĉinio — Evoluo kaj fondo de sekcioj en Azio, Afriko kaj Latin-Ameriko.

Jarkolekto 19 **okt.-dec. 1989** **N-ro 4, 1989**

«Internacia Pedagogia Revuo» estas sendependa forumo de la tutmonda pedagogaro. Ĝi aperas kvarfoje jare. La redakta komitato rajtigas sin mallongigi aŭ korekti la manuskriptojn nur laŭ lingvaj vidpunktoj. Manuskriptojn ni ne resendas. Reproduktaĵoj, tradukaĵoj estas permesataj, eĉ rekomendataj, kune kun fontindiko.

Azia konferenco pri la instruado de Esperanto

06-12 novembro 1989 en Nanning (Ĉinio)

1. Konferencejo

Universitato de la Nacioj, fakte de la naciaj minoritatoj, ekster la urbo Nanning. Tre konvena loko, en granda bela parko, sufiĉe komforta kaj disponante pri diversaj adekvataj ejoj por la kunvenoj kaj la ekzamenoj.

2. Intereso kaj utilo

Kvankam la nombro da partoprenintoj estis pli malgranda ol la organizintoj esperis ricevi, laŭ tri vidpunktoj la konferenco valoris esti organizata.

a) Ĝi permesis iomete trarompi la internan izolitecon de la ĉinaj aktivuloj mem kaj doni al ili la okazon interkonatiĝi kaj interŝanĝi siajn spertojn kaj ideojn. Ni ne forgesu, ke la distancoj en Ĉinio estas tre grandaj (multaj partoprenintoj vojaĝis trajne dum kvin tagoj kaj noktoj, eĉ pli por atingi Nanning...)

b) La A.K. permesis al kelkaj eksterlandanoj (el Belgio, Estonio, Japanio, Koreio, Usono, Svedio) rekte konatiĝi kun la fundamentaj problemoj kiuj karakterizas la ĉinan E-movadon kaj persone diskuti kun homoj kun kiuj ili ofte korespondis sed neniam renkontis.

c) Pro la ĉeesto de partoprenintoj el ĉiuj gravaj regionoj kaj centroj de Ĉinio, ĝi estis unika okazo por organizi Internacian Ekzamanon laŭ la nova UEA/ILEI sistemo.

Aldonu al tio la fakto, ke d-ro GILSU SO, estrarano de UEA pri Azio kaj mi mem, kiel prezidanto de ILEI, daŭre kaj aktive partoprenis en la konferen-

Raporto ekskluziva al IPR

co: tio konsistigas grandan kuraĝigon por ĉiuj ĉinaj aktivuloj, kiuj tiom malofte havas la okazon renkonti eksterlandanoj kaj pruvi sain konon de la I.L. Ni ne subtaksu ĉi tiun psikologian elementon kiel stimulan faktoron por la tuja estonteco. Kaj ekde nun, ni iom bone scios pri kio ni parolas...

3. Internaciaj ekzamenoj

a) Mi kunportis 20 ekzemplerojn de la antaŭ nelonge aperinta *Gvidilo al la elementa kaj meza niveloj de la internaciaj ekzamenoj de UEA kaj ILEI*, 20 atestilojn kaj la necesajn testojn por organizi ekzamenan sesion je tiuj niveloj. Por ĉiu grupo sin prezentis po ok kandidatoj.

b) La Loka Ekzamena Komisiono konsistis el:

LI WEILUN, vic-profesoro ĉe la Fremdlingva Fakultato de la Pekina Lingva Instituto;

LIAN ZIMING, docento kaj direktoro de la Oficejo pri Eksteraj Aferoj kaj Esperanta Esploro-Sekcio ĉe la Guangxi Nacio-Universitato en Nanning;

ZHANG DANCHEN, vic-profesoro ĉe la Normal University, Foreign Languages Dept. en Wuhan

Ili tri estas spertaj esperantistoj kaj tre agemaj homoj.

c) La Gramatika antaŭtesto, la skriba kaj la parola ekzamenoj forprenis proks. 2+3+2 horojn (sen la korektoj...). Pro aliaj programeroj, la ekzamenoj plej ofte okazis vespere kaj tio certe ne estas la plej favora momento de la tago por ekzameniĝi.

ĉ) El la respondoj kaj la starigitaj demandoj evidentiĝas ke la testoj, laŭenhave, iom devas esti adaptitaj al la ĉinaj vivcirkonstancoj kaj pensmanieroj, sed entute ili tamen taŭĝas kaj estas valoraj. Temas pri detaloj. Mi pro tio petis la Ekzamenan Komisionon atente retralegi la taskojn kaj formuli siajn rimarkojn tiurilate.

d) La Gvidilo ludos gravan rolon por ordigi, unuecigi kaj harmoniigi la multajn kursojn, kiuj okazas tra la tuta lando. Oni nun havas konkretan celon.

e) Mia tasko estis klarigi al la membroj de la Ekzamena Komisiono kaj al la kandidatoj kiuj estas la celo kaj la enhavo de la ekzamenoj. Mi poste faris al ala membroj de la komisiono, kiuj nun spertis kiel kion fari, kelkajn konkretajn sugestojn:

- konsistigi komisionon de fakkapablaj gekolegoj por ellabori unuan serion de testoj;
- sendi ĉi tiun unuan serion al la sekretario de la Internacia Ekzamena Komisiono, Stefan MacGill, por pritakso kaj aprobo. Poste, la ĉina komisiono povos, laŭ la sama skemo/modelo, ellabori plurajn testojn.



- listigi ĉiujn E-instruistjn, precipe en la grandaj centroj, noti ties lingvokonon, fakkapablon kaj pretecon organizi tra la lando sesiojn de la Internaciaj Ekzamenoj.
- esplori ĉu kaj kiam eblas, dum limigita periodo, organizi I.E.-sesion.
- se tiuj ebleco kaj preteco vere ekzistas, okazigi ĝeneralan sesion, sed NUR tie, kie fidindaj kaj kapablaj fakuloj persone povas respondeci pri la seriozeco kaj la nivelo de la ekzamenoj.
- aparta regularo estu verkita por precizigi ĉiujn materiajn kaj enhavajn aspektojn de la ekzamenoj en Ĉinio, la rajtojn kaj devojn de la ekzamenantoj kaj de la kandidatoj, kiel konstigigi ekzamenarkivejon, ktp.

Ĉi tiu unua ekzamensesio laŭ la I.E.-sistemo fariĝis pozitiva eksperimento, kaj sendube estos sekvata de multaj aliaj sesioj.

4. Intervenoj

En pluraj larĝaj intervenoj kaj debatoj, mi substrekis diversmaniere, laŭ pluraj starpunktoj, kelkajn esencajn aspektojn kaj elementojn de la E-instruado ĝenerale kaj de la ĉina situacio aparte, i.a. rilate al la *prononco* (atentenda problemo por la ĉino), la *fluecon* de la parolo (en tro da E-grupoj oni daŭre krokodilas!), la *vortrezoro* (neceso disponi pri plei diversaj legaĵoj) kaj la *gramatika ĝusteco* (neceso de simplaj, sed bonaj lernolibroj).

Mi substrekis la nepran neceson sisteme kaj science pristudi la bazajn lingvajn malfacilaĵojn por ĉinoj rilate al serioza lernado de Esperanto kaj kalkuli je tiuj malfacilaĵoj en la verkado de lernolibroj.

Mi plurfoje kaj energie atentigis pri la nepra postulo gardi la internacian karakteron de Esperanto kaj eviti ĉiujn tro naciemajn prononcmanierojn, esprimojn, ktp.

Mi ankaŭ pritraktis la neceson disponi pri bone strukturitaj, organizitaj kaj funkciantaj instancoj kiel ĈEL kaj ILEI, kiuj cetere daŭre devas kunlabori. ĈEL, kies aganta ĝenerala Sekretario LIU LING partoprenis en la Konferenco, baldaŭ disponos pri tute nova estraro, kaj al la sekciestro de ILEI, ZHANG DANCHEN, mi donis apartajn detalajn sugestojn kaj konsilojn rilate al la rolo de la vicsekciestroj, la varbado de membroj, la kotizoj, la disvastigo de la revuo *Juna Amiko* kaj de IPR.

Kun LIANG ZIMING , la iniciatinto de la nuna unua Azia Konferenco, mi havis multajn utilajn interŝanĝojn de ideoj pri la tekniko de organizado, la neceso komenci la laboron tre frue, la neceso verki memorandojn por plifaciligi la organizadon de kunvenoj, seminarioj, kongresoj, ktp. kaj tiel liberigi la kapon je multaj farendaj kaj kontrolendaj aferoj, kiujn oni povas konfidi al la papero. Mi sendos al li la memorandon, kiun mi verkis kaj kiun ni ĉiujare uzas por organizi niajn proprajn konferencojn.

Kun vic-profesoro LI WEILUN el Pekino, kiu estis la prezidanto de la Loka Ekzamena Komisiono, mi longe kaj detale pritraktis la aferon de la ekzamenoj: kiel prepari la testojn laŭ la modelo de la Gvidilo, la neceso adapti ĉi tiujn al la ĉinaj cirkonstancoj, kulturo, vivmaniero, ekz. rilate al la uzo de nomoj, de lokoj, de esprimoj, de desegnaĵoj, ktp.

"Internacia lingvo nepre estu komprenata, tuj kaj senprobleme, en ĉiuj landoj, de ĉiuj homoj, ne nur rilate la prononcon, sed ankaŭ rilate la esprimon de pensoj kaj sentoj. Se ne, la internacia interkompreniĝo restas duba, eĉ neebla. La estiĝanta nova internacia komunumo, kies esprimilo estas Esperanto, estas pli ol la nura adicio de naciaj komunumoj. Temas pri nova ekvilibro, nova harmonio kun propraj trajtoj kaj karakterizaĵoj, propra interna dinamiko kaj evolukapablo. La estiĝo de tiu nova komunumo estas komparebla al la estiĝo de la modernaj unuecaj ŝtatoj el la plej diversaj lokaj kaj regionaj unuoj kaj ĝi estas stimulita kaj rapidigita de la moderna teknologio kaj la komunikebloj plej variaj, kiuj trarompas vole-nevole ĉiujn formojn de izoliteco. Kie ajn ni loĝas, ni ne kapablas ignori nek preterpasi la grandajn sociajn kaj politikajn evoluojn en la mondo. Ni ne plu agas en fermitaj rondoj, aŭ pli bone, ni ne plu devus agi tiel, ĉar ni tro ofte ja faras: ni agu kaj integriĝu en la konkretajn soci-politikajn kaj kulturajn realaĵojn je la fino de la 20a jarcento."

Mi petis lin tralegi la materialon de Mag. Irena Szanser por vidi ĉu ĝi entute, aŭ nur parte, aŭ tute ne taŭgas por organizi instrurajtigajn kurojn kaj ekzamenojn en Ĉinio, kiel ni faras en La Chaux-de-Fonds.

En preparita prelego, kiun mi parte jam prezentis en Caerleon okaze de la 23-a ILEI-Konferenco, mi klarigis la neceson ne disigi la Esperanto-movadon de la socio en kiu ĝi ekzistas kaj vivas, sed daŭre adaptiĝi kaj aktualiĝi. Mi situis la fenomenon Esperanto en la tuto de ĉiuj elementoj, faktoj, instancoj, personoj, instruantoj kiuj kune ebligas Esperanton funkcii kiel Internacian Lingvon. Du citaĵoj el tiu teksto troviĝas apude. Leitmotivo daŭre estis: ne foroferi la kvaliton pro la kvanto ĉar en Ĉinio antaŭ nelonge oni iom tro substrekis mirindajn ciferojn, sed tiuj ne korespondis al la reala kono de la lingvo.

"Ni neniam forgesu, ke ni ŝuldas nian progreson al la skriba vorto kaj al la akumulita sperto. Sed ne sufiĉas diri tion, ni ankaŭ devas pruvi kaj provi ĝin, sisteme realigi niajn intencojn. Izolita individuo ne povas fari tiun ampleksan laboron. Nur homogena, bone strukturita kaj motivita teamo kadre de solida asocio povas alfronti ĉiujn akompanantajn problemojn.

Forta kaj funkcianta ILEI ne estas celo en si mem, sed ja nepre necesa kondiĉo kaj instrumento por atingi nian celon, kiu estas kiel eble plej bone instrui Esperanton al kiel eble plej multaj homoj tra la mondo.

Oni ofte prave riproĉas al la Esperanto-movado ĝian eŭrocentrismon. Malofte temas pri intenca sinteno, sed pri nescio kaj nekonscio kaj ankaŭ pri historia evoluo. Tio validas ne nur en la Esperanto-movado, sed ankaŭ en la ekonomio, la politiko, la sociaj rilatoj kaj la kulturaj interŝanĝoj. Ne estas facile orientiĝi en alia kulturo, en alia pensmaniero, en aliaj kutimoj. Tiuj diferencoj ne signifas, ke unu estas pli bona aŭ valora ol alia, nur ke ili tutsimple malsimilas. Toleremo kaj komprenemo povas transponti kaj akceptigi la multegajn kaj samtempe riĉajn diferencojn inter la popoloj. Tiu realo konsistigas unu el la plej gravaj kaj ampleksaj problemoj en la unuiĝanta internacia komunumo. El ĝi fontas multaj miskomprenoj, antaŭjuĝoj, eĉ malamikaĵoj. Kiel diras la proverbo: nekonata, neamata. Sur ĉi tiu kampo, Esperanto povas ludi tre gravan rolon, ĉar ĝi alpaŝas al la diversaj nacioj sen kiu ajn altrudo, surbaze de objektiva egalrajteco kaj fundamenta egaleco de ĉiuj popoloj kaj kulturoj. Tio ne validas por naciaj lingvoj, kiuj vole-nevole trudas sian propran, subjektivan kulturon kaj pensmanieron.

En tiu senco, Esperanto estas multe pli ol nura komunikilo; ĝi povas instigi al pli granda interkompreniĝo kaj konsistigi aglutinilon en la estiĝanta internacia komunumo. Esplori ĉiujn aspektojn de tiu soci-politika alvokiĝoa apartenas al nia taskaro."

LIU WEIZHUANG, deĵoranto ĉe la al Esperanto-Asocio de la Scienteknika Asocio Guangzhou kaj lia edzino CHU LI HONG, kiu deĵoras en la Komerca Ĉambro de Guangzhou, proponas organizi turisman-kulturan vojaĝon al Ĉinio el Eŭropo laŭ la plej favoraj kondicoj. Nur la flugo al Pekino aŭ Honkongo estus antaŭmenditaj el Eŭropo. La rondvojaĝo en Ĉinio estus organizita de ĉinaj esperantistoj, laŭ la ĉinaj enlandaj tarifoj kaj kondiĉoj, multe pli favoraj. La Europa karavano ne nepre devus konsisti el nur geinstruistoj, sed ankaŭ komercistoj, kuracistoj, k.a. Se eblas, estus bone arigi homojn el diversaj eŭropaj landoj. La ideo; 'Eŭropanoj vizitas Ĉinion pere de Esperanto' povus esti taŭga slogano, kiu eventuale, se funde preparita, povus allogi kaj interesi la amaskomunikilojn. Ni multe pridiskutis la proponon, kiu nun estas lanĉita kaj devas maturiĝi, sed ĝi certe estas realigebla.

LU JIXIN, oficisto el Guilin, petas nian atenton pri la ĉina poezio kaj literaturo ĝenerale. Li mem estas poeto kaj senprobleme improvizas poemojn laŭ

ĉiuj cirkonstancoj, sed li ankaŭ tradukas, kun teknikaj klarigoj, el al klasika ĉina poezio.

Li sendos al mi artikolon rilate al la ĉina poezio, kaj mi klopodos aperigi ĝin en esperantista revuo. Ankaŭ tio estas provo trarompi la izolitecon, kiun tre forte sentas niaj ĉinaj samideanoj.

Donante al mi sian vizitkarton, Lu Jixin rapide notis sur ĝin jena mallonga poemeto;

Konatiĝi
Mi mutas
Vi mutas
La kapoj ambaŭ krutas
rigardon ŝutas
Temp' gutas
dir' gutas
kaj kiam koroj flutas
nin ard' englutas

Ankaŭ CUI JIANHUA, docentino pri la franca lingvo ĉe la Nanjing Universitato, tre interesiĝas pri la sama literatura temo.

LI WEILUN, pri kiu mi jam parolis, prelegis pri la rolo de ludoj en lingva instruado. Mi promesis kontaktigi lin kun kolegoj, kiuj ankaŭ interesiĝas pri la sama temo.

LIU JUNFANG, raportisto ĉe Radio Pekino, insiste petas per ĉi tiu vojo ricevi kiel eble plej multajn informojn de kaj pri UEA kaj ILEI, sed ankaŭ de aliaj esperantistaj organizaĵoj. Li elektos kio estas uzebla por siaj elsendoj. Li intervjuis min tre longe pri diversaj aspektoj de la E-movado.

Prof. SOLIVA (SHAO RONG) ĉe la Fakultato de Aplika Matematiko de la Dalian-a Instituto de Teknologio, tre interesiĝas pri la teknologiaj aspektoj de Esperanto kaj verkas lernolibrojn en tiu senco. Li meritas plenan apogon.

5. Metodologio

a) Ni rigardis du filmojn, kiujn mi kunportis;

-La Cseh-metodo, prezentita de Audrey Childs-Mee;

-Diversaj metodoj, video/filmo realigita en Budapeŝto, sub la gvidado de Zsuzsa Barcsay.

-La Espero, video-filmo pri E-instruado per praktika uzado en diversaj vivcirkonstancoj, realigita de Ĉina samideano Wei Bing, kiu nun plentempe laboras por la Qingdao Esperanto-Asocio.

b) Nur rigardi la filmojn, sen antaŭ, duma aŭ poste klarigo pri la enhavo, la celo, la metodo ktp. ne alportas multon al la spektantoj. Ili sufiĉe rapide perdas sian atenton. Ni poste diskutis pri la maniero uzi tiujn filmojn, per enkonduko, demandaro k.s.

6. Aliaj programeroj

a)*Prelegoj*

Krom la jam menciitaj, prelegis ankaŭ;

MADIS LINNAMAGI el Estonio pri spertoj de E-instruado al estonaj galernantoj;

S-ino ASTA SCHAEDEL, el Malmo, Svedujo, pri sia lando, per video-filmo.

LU JIXIN pri utileco de poemoj en E-instruado.

SHAO RONG (Soliva): Kelkaj faktoj pri la oficiala E-instruado en Ĉinio.

b)*Artvesperoj*

Profesiaj ĉinaj artistoj (kantistoj, muzikistoj, dancistoj kaj dancistinoj k.a. regalis nin dufoje je vere tre altnivelaj spektakloj, tute neforgeseblaj.

c)*Ekskursoj*

-Duontaga ekskurso en la urbo Nanning, kun vizito al la mirinda urba parko, al la tre riĉa regiona muzeo:

-Tritaga ekskurso al Guilin, en la fino de la Konferenco, kun ŝipveturado sur la Li-rivero.



La prezidanto de ILEI kaj verkinto de ĉi tiu raporto, s-ro Edward Symoens, alparolas la konferencon en Nanning. Elĉerpaĵojn el tiu prelego vi povas legi en la kestoj sur paĝoj 4 kaj 5

ĉ)*Vizitoj*

I.a. al la surloka ekspozicio pri nacimalplimultoj.

d)*Malferma kaj ferma solenaĵoj*

Dum la malfermo, ĉeestis pluraj eminentuloj de la Universitato Nanning. La rektoro eĉ parkeris sufiĉe longan Esperanto-alparoladon.



7.Konkludoj

a) En Ĉinio, ni trovas ĉe la esperantistoj senliman deziron agi kaj perfektiĝi, sed tre ofte ili ne scias kiel fari tion kiel organizi, kiel plani.

b) Ilia konvinkiteco evidentiĝas el la fakto, ke la plejmulto el ili trajnis 3 ĝis 6 tagojn kaj eĉ pli por partopreni en la Konferenco. Tia sindediĉo plenplene meritas nian atenton kaj helpon.

c) Aliflanke, por la granda nombro ni agu kaj helpu selekte, sed por ebligi tion, ni bezonas de la ĉinoj mem seriozan kaj fidindan inventaron de la ĝusta situacio en la diversaj regionoj de la lando. Estos la tasko de la nova estraro de ĈEL fari tion. Preparlaboron jam faris la estrarano de UEA, SO GILSU, kiu dediĉis tutan matenon esplordemandante ĉiujn regionajn reprezentantojn pri la situacio rilate Esperanton en aliaj respektivaj agadmedioj. (universitato, klubo, grupo). Lia raporto estos utila labordokumento por plua esplorado.

ĉ) Oni unuanime konsentas pri la propono, ne krei tro vastan kaj grandskalan edukejon en unu sola loko, ekz. en Ŝanhajo, sed krei plurajn regionajn edukajn centrojn, bone ekipitajn, nur tie kie ekzistas kerno de valoraj, fidindaj, realismaj kaj kapablaj esperantistoj.

d) La esenca kaj plej urĝa tasko konsistas en la pliperfektigo de la instruantaro. Mi atendas raporton de LI WEIHUN pri la verko de Szanser, por organizi provsesion de kurso kaj ekzameno, simile al tio en La Chaux-de-Fonds.

e) El multaj raportoj kaj konversacioj klare evidentiĝas, ke la ĝenerala intereso pri Esperanto ĉe la studentoj serioze malkreskas. En multaj kursoj ne plu

estas studentoj, ĉar ĉi tiuj ne vidas la tujan utilecon kaj uzeblecon de la lingvo. Necesos kalkuli je tiu fakto ellaborante novan strategion.

f) Mankas tuta gamo de modernaj lerniloj kaj legaĵoj. Surbaze de la Internaciaj Ekzamenoj, kiuj estis aparte bonvenaj, oni nun intencas pli sisteme ellabori la necesajn lernmaterialojn. La Internacia Ekzamena Komisiono nepre devas sekvi la evoluon tiurilate. Entute, la situacio ne estas tiom malbona, male. Sed la movado tie troviĝas sur vojkruciĝo. Ili atendas de ni konkretan helpon, realigeblajn konsilojn kaj sugestojn. Ni klopodu helpi al ili trarompi la senton de izoliteco, kiu karakterizas multajn agemulojn. Pro transpagproblemoj, plej multaj esperantistoj ne povas aboni eksterlandajn revuojn kaj gazetojn, aĉeti esterlandajn librojn. La Azia Fondaĵo de UEA eventuale povos fari ion sur tiu kampo.

g) Sendude ekzistas eblecoj pri kunlaboro sur diversaj kampoj, ekz. tiu de la eldonado. Kadre de la ĝenerala eldonpolitiko de ILEI, ni ne forgesu tiun eblecon, pri kiu mi ankaŭ havis kuraĝigajn diskutojn surloke. Tio povus parte solvi la problemon de la kotizoj, de la ĝeneralaj kostoj, sed precipe de la materialo, kiun ILEI povus disponigi al la ĉinaj studemuloj.

Fina konkludo

Mi neniam forgesos la sinceran, kortuŝan, eĉ emocian amikecon, kiun mi spertis ĉe niaj ĉinaj gekolegoj. Ili atendas multon de UEA kaj de ILEI.

Ni ne rajtas seniluziigi, elrevigi ilin...

Edward Symoens, Prezidanto de ILEI

La socipolitika kaj pedagogia kaj kultura valoroj de Esperanto

Ĉi tiu baza informa verko de nia prezidanto, s-ro Edward Symoens, estas nun havebla en kvar lingvoj: Esperanto, la angla, franca kaj nederlanda. Ĝi prezentas koncize la celojn kaj strukturojn de la lingvo, kaj poste listigas argumentojn pri ĝia pedagogia valoro kaj kultura rolo. Unu sekcio resumas la ĝisnunajn eksperimentojn pri la efikeco de Esperanto-instruado kaj la influo sur lernado de naciaj lingvoj. Fine ĝi prezentas resumon pri la nuna stato de la instruado. La kvardek-paĝa verko aperis en Esperanto kadre de la serio 'Esperanto-Dokumentoj' de UEA sub numero 23E. La anglan kaj francan versiojn eldonis ILEI kaj la nederlandan FEL. Mendu ĉe UEA, Nieuwe Binnenweg 176, 3015 BJ Rotterdam, Nederlando aŭ Flandra Esperanto-Ligo (FEL), Frankrijklei 140, B-2000 Antwerpen, Belgio.

Esperante: 3 gld. kun triona rabato ekde 3 ekzempleroj ĉe UEA / 57 BEF kun rabato de 10% ekde 3 ekz. ĉe FEL.

Angle, france: Prezo ĉe UEA fiksota / 145 BEF ĉe FEL kun trjona rabato ekde 3 ekz.

Nederlande: 5,40 gld. kun sesona rabato ekde 3 ekz. ĉe UEA / 100 BEF ĉe FEL kun triona rabato ekde 3 ekz. Sendokostoj aldoniĝas ĉiukaze.

Fondaĵo Szerdahelyi

1. Pravigo kaj celoj

ILEI nun forlasas la periodon de reorganizado kaj revigligado por eniri periodon de realigoj kaj plenumado de faritaj promesoj. Inter tiuj ni citas:

a) Eldonado, sur ekonomia kaj profesia bazo, de diversspecaj pedagogiaj verkoj, i.a. internaciaj lernolibroj, korespondaj kaj perfektigaj kursoj, legolibroj je ĉiuj niveloj kaj kategorioj, didaktikaj kaj metodologiaj verkoj. Plie, produktado de son- kaj video-bendoj, de didaktika materialo kaj la eldonado de informaj verkoj. Tiuj eldonaĵoj estos vendataj kaj produktos enspezojn, sed ni ankaŭ devas antaŭvidi la senpagan uzon por valoraj kaj meritplenaj gekolegoj en netranspagipovaj landoj.

b) ILEI precipe okupiĝos pri la edukado/trejnado de instruantoj kaj la perfektigo de profesiaj instruistoj je ĉiuj niveloj. Por fari tion, ĝi ne nur bezonas taŭgan instru-materialon, kiun ĝi realigos en la Eldona Fako, sed estos necese organizi kursojn kaj ekzamenojn en zorge elektitaj centroj kaj institucioj tra la mondo. Kvankam la kandidatoj devos pagi por la kursoj kaj ekzamenoj, ni tamen bezonas pli da mono por pagi eĉ limigitan honorarion, vojaĝkostojn kaj restadon al la kursestroj, doni stipendiojn/subvenciojn al meritplenaj gestudentoj, eventuale pagi luprezon por la uzotaj salonoj.

c) Por daŭre aktualigi sian laboron, ILEI nepre devas fari sciencan esploradon, partopreni en fakaj kolokvoj, kongresoj kaj konferencoj, aboni fakajn revuojn ktp.

ĉ) Ne eblas daŭrigi senpune la kutimon ĉion fari senpage, ĉar temas pri Esperanto. Estas normale, ke kapablaj kaj aktivaj fakuloj trovu iun financan kompenson por sia poresperanta penado, sia sindediĉo, la uzo de tempo kaj energio, kondiĉe, ke tio servu al la progreso de la Esperantokomunumo. Ni pensas pri verkistoj, redaktoroj, kursestroj, sciencaj esplorantoj k.s.

d) ILEI urĝe bezonas Centran Oficejon kun konstanta adreso, kiu devus situi en iu ekzistanta, bone funkcianta E-centro aŭ instituto sed al kiu ni devus pagi luprezon, deĵoranto(j)n, ekipaĵojn, telefonadon, fotokopiadon ktp.

e) Urĝas, ke ILEI organizu vastan informkampanjon en pedagogiaj medioj en pluraj landoj samtempe laŭ jam ekzistanta plano.

Sed ĉiuj tiuj projektoj kaj celoj postulas monon, multan monon, kiu ne povas veni de la nuraj kotizoj.

2. Kiel pligrandigi la enspezojn de ILEI?

a) La kotizoj, kiu inkluzivas la abonon al IPR, devas resti moderaj kaj principe la samaj por ĉiuj membroj. La enspezoj el tiu fonto kaj la ekzistanta kapitalo servas al la ĉiutaga funkciado de la Ligo, la eldonado de IPR kaj de la informaj cirkuleroj k.s.

b) Por realigi la ampleksajn projektojn kaj la celojn, kiujn ni menciis supre, ILEI bezonas multe pli da enspezoj. Por kolekti la bezonatajn novajn monrimedojn, la estraro decidis starigi Fondaĵon, kiu apelacias al la donacemo de tiuj homoj, membroj kaj nemembroj, kiuj deziras finance apogi nian agadon.

Honore al prof. d-ro István Szerdahelyi, eminenta pedagogo kaj verkisto, prezidanto de ILEI de 1985 ĝis 1987, la estraro proponas kunligi lian nomon al la Fondaĵo.

3. Praktikaj aranĝoj

a) Donacontoj povos pagi al unu el la ekzistantaj kontoj de ILEI:

Poŝĝirkonto 682117-7 (Stockholm) al la nomo de Internacia Ligo de Esperantistaj Instruistoj (ILEI), Södra Rörum pl. 455, S-242 94 Hörby, Svedio.

Poŝtĝirkonto de UEA, 378964, Nieuwe Binnenweg 176, NL-3015 BJ Rotterdam, Nederlando por la interna konto ilek-a de ILEI.

Ambaŭkaze indiku klare: donaco por Fondaĵo Szerdahelyi.

b) La kasisto de ILEI aparte registras kontribuaĵojn kaj elpagojn, ĝiras la donacojn al speciala konto, kiu donas la plej favoran renton: Konto 5612 33 008 49 ĉe Skandinaviska Enskilda Banken.

c) La nomoj de la donacintoj regule aperas en IPR en konstanta rubriko.

ĉ) Du revizoroj, nomitaj de la Komitato, ĉiujare antaŭ la unua de julio, kontrolos la en- kaj el-spezojn de la Fondaĵo kaj faros raporton, kiu estos diskutata dum la ILEI-konferenco kaj kiu aperos en la septembra numero de IPR.

d) Post unu jaro, surbaze de la estinta sperto, la estraro de ILEI decidos kiel estonte administri la Fondaĵon.

Decembro 1989
La Estraro de ILEI

S-ro Claude Gacond demonstras sian perbildan instruadon al disĉiplo de Szerdahelyi, unu el la nunaj gvidantoj de la universitata fako, kiun li fondis. Ankaŭ vi povos konatiĝi kun la metodo; vidu la anoncon sur la sekva paĝo.



kun komunismaj landoj. Mi memoras, kiel komunista membro de nia Urba Konsiuantaro, s-ro **Brouillet** foje helpis kunportante dokumentojn en la valizo por li. Ni dekomence kontaktis **Haupenthal**, kiu lanĉis similajn iniciatojn, la literaturan rondon *Patrolo* de **Silfer**, la japanajn "oazojn"...

IPR: *en la E-a dezerto...*

CG: Nun oni ofte eĉ prenas KCE kiel modelon. Tamen ne eblas imiti ĉiujn niajn specifaĵojn: la abundon da disponebla materialo, la eksperimentan metodologion, la montaran ĉirkaŭaĵon, la daŭran loĝeblon.

IPR: *En kio konsistas la pedagogia originaleco de KCE?*

CG: Jam el la plurlingveco de nia lando sekvas, ke ne eblas uzi tradukajn metodojn. Proponiĝas preskaŭ sola, la Ĉe-metodo – tre utila, sed 50 jaroj pasis super ĝi! Oni ankaŭ devus emancipiĝi de la kutima, latin-origina terminologio, kiu ofte misgvidas, ĉar ĝi estis elpensita por aliaj lingvoj ol E-o.

IPR: *Iun terminologion oni tamen devas uzi...*

CG: Vidu, ni parolas jene: serĉu la *kerno*n de la frazo! Ĝin montras verba finaĵo. Sekvas la *piloto*, kiu forme identiĝas per finaĵo *–o(j)* aŭ per *mi, vi ktp.*. La *piloto* gvidas, stiras la agadon, kiu direktiĝas al la *nepilotoj*, indikitaj per *-n*, per *antaŭvortetoj al, per ktp.* En unu frazo troviĝas pluraj *pens-unuoj*, ĝenerale samtiom kiel *kerno*-vortoj. Ĉe la radikoj ni parolas simple pri *o-emaj, a-emaj, as-emaj* aŭ *memstaremaj* elementoj. Se en frazo aperas ekz. la vorto „parolon", ni diras, ke ĝi estas *as-ema* vorto *-on-forma*.

IPR: *Ĉu ne estas tro formisma aliro de la problemo?*

CG: Ne temas pri lingvistike neriproĉebla priskribo, sed pri didaktika helpilo, kiu laŭsperte eĉ komprenigas pli bone la funkciadon de la propra lingvo. Atinginte plenan komprenon, oni ja povas forĵeti tiujn ĉi „lambastonetojn".

IPR: *Ĉu vi kontentas pri ILEI, pri via kunlaboro kun ĝi?*

CG: Jes kaj ne. Ni sisteme okazigas ekzamenojn de ILEI/UEA, anoncitajn ankaŭ en via revuo. Sed svisoj ne multe aperas en ILEI-kongresoj; laŭ mi malhelpas iu nia malkongresemo, se temas pri enmovadaj aferoj. Ni pli kredas je enkorpigo de Eo en tutsociajn aferojn kiel la Freinet-movado, je la partopreno en ekstermovadaj konferencoj. Vidu, mi ankaŭ memoras la esploron de **Brent**, kiu observis la lingvan nivelon de SAT-kongresanoj en Ontario, kaj konstatis, ke por la plejparto akuzativo ŝajnis iu obskura truko, kiun ili uzis, se la substantivo sekvis la verbon...

IPR: *Nu, espereble en niaj kongresoj ne estas tiel...*

CG: ILEI devus povi helpi pli en la plenuma fazo de tiuj ekzamenoj, kaj en la diskonigo de diversaj metodoj. Kiel en multaj aferoj, ankaŭ en metodiko estas tro da profetoj en E-io. Ne estu UNU metodo; ankaŭ KCE ne havas „KCE-metodon". Ĉiu agu laŭ la propraj rimedoj donitaj.

IPR: *Kiel vi resumus la devizon de via agado en KCE?*

CG: E-io estas subevoluinta lando, kie la spacaj interrilatoj estas tre malfacilaj; inter la klerularo kaj la popolo mankas sufiĉa osmozo. Ni celas proponi rimedon al ambaŭ tiuj misoj.

IPR: *Mi dankas la intervjuon, ankaŭ kiel gasto de KCE, profitinto de tiuj rimedoj.*

Intervjuis ERTL István

Ne forgesu la sekvajn kursojn de ILEI kaj ILEI-anoj en Kultura Centro Esperantista
(Pf. 779, CH-2301 La Chaux-de-Fonds, Svisio)

APRILO, 16-21: Lingvo-kurso kaj ekzamenoj UEA/ILEI. (MacGill)
JUNIO, 25 - 30: Pristudo de 'La infana raso' (Ertl)
JULIO, 2 - 7: Lajos Tárkony kaj la Budapeŝta Skolo (Ertl)
JULIO 30- AŬG 4: Perbilda instruado (Gacond – vidu la foton sur p.13)
AŬGUSTO 6 - 18: Pedagogia-metodika kurso kun ekzameno (Szanser)

Vidu pli kompletan kaj detalan liston en la antaŭa IPR. Plej kompletajn informojn pri ĉiuj kursoj petu de KCE ĉe la supra adreso.

La plej facila lingvo — malfacile lernebla

Maria MERLA

Rimarkoj pri E-o-didaktiko en F. R. Germanio

E-on oni prefere nomas la plej facila lingvo de la mondo. Malgraŭ tio ŝajnas esti nekredeble malfacile lerni kaj instrui E-on per metodo, en kiu estas realigataj la plej novaj didaktikaj eltrovaĵoj. Ne temas pri tio, ke ne ekzistus lernolibroj. Ne nur ekzistas deko da lernolibroj por komencantoj, kies gepatra lingvo estas la germana, sed ankaŭ ekzistas specialaj instrumetodoj kiel *korespondaj kursoj* aŭ *programita instruado*.

Ekzistas homoj aparte talentitaj por lingvolernado, al kiuj sufiĉas mallonga gramatiko, ekz. *Esperanto auf einem Blatt* (E-o sur unu folio) kaj vortaro por alproprigi al si surbaze de teksto sufiĉajn pasivajn konojn de la lingvo dum kelkaj tagoj. Sed ekzistas ankaŭ kompatinduloj (eternaj komencantoj), kiuj dum jaroj, foje dum jardekoj, restadas en la Eo-medio sen iam ajn elbuŝigi multe pli ol "bonan tagon" kaj "ĝis revido". Tiu problemo devus ne ekzisti, se E-o fakte tiel facile lerneblus, kiel oni emas aserti.

La facileco de la lingvo sole ne estas kriterio

La praktika sperto pri Eo-instruado montras, ke la reguleco de la gramatiko kaj la facileco de la vortfarado ne estas sufiĉaj kondiĉoj por sukcesa lingvoinstruado. La proporcio de la ĉesantoj en plursemajnaj lingvokursoj estas komparebla al tiuj por la multe pli komplikaj naciaj lingvoj. Se restas unu el dek partoprenantoj ĝis la fino, oni jam povas nomi tion bona sukceso, ne konsiderante la realajn konojn de la lernanto.

Pri la kialoj de tiu nekontentiga rezulto oni jam multe teoriadis. Sendube estas pli facile ĉesi en Eo-kurso, kiun oni kutime konsideras kiel nuran ŝatokupon, kompare al kurso pri la angla, franca aŭ rusa lingvoj, kiu promesas doni profesie uzeblajn kromajn kvalifikojn. Tamen ne sufiĉas tiu klarigo, ĉar ofte oni indikas kiel kialon de la ĉesado la tro malgrandan lernoprogreson, kiu kaŭzas nekontenton ĉe la kursanoj. Ĝuste rilate al tiel facila lingvo kiel E-o devus esti eble atingi lernoprogreson, kiu motivigas plulernadon.

La kialojn de la nekontentiga evoluo de multaj E-o-kursoj endas vidi en la jenaj faktoroj:

* nesufiĉa instrumaterialo (malmoderniĝintaj, enuaj tekstoj, kies enhavo neniel rilatas al la kutima ĉiutaga sperto de la gelernantoj);
* malsufiĉe klerigitaj instruistoj.

Tiuj estas nek novaj nek originalaj ekkonoj. De jaroj oni plendas pri tio, ke ne ekzistas sufiĉa nombro da adekvate klerigitaj instruistoj, nek unueca instruplano, kiu provas apliki la plej modernajn didaktikajn ekkonojn. Tiu kritiko tamen celas nur la situacion ĉe la ĝenerale klerigaj lernejoj. De tiuj lernejoj oni postulas, ke ili integriĝu en la instruplanon la Eo-instruadon kiel devigan aŭ almenaŭ libere elekteblan fakon. Tiukaze la respektivaj respondecaj ministerioj de la federaciaj landoj devus dekreti la necesajn direktivojn.

La situacio en la lernejoj por ĝenerala klerigo ne estas mezurilo

La *Germana Esperanto-Instituto* ekde kelkaj jaroj klopodas plenumi almenaŭ la formalajn kondiĉojn, kiuj estas necesaj por la enkonduko de E-o kiel instrufako. Situacio, kiu ekde kelkaj jaroj ekzistas en Hungario kaj Bulgario, kaj kiu eble baldaŭ ekzistos en GDR.

Sed tiuj klopodoj malatentas la praktikajn necesojn de la Eo-instruado en FRG, kie nur malgranda parto de la instruado okazas en la kadro de la ŝtata lerneja sistemo. La E-o-instruado okazas preskaŭ komplete kiel por-plenkreskula klerigo kaj en tiu kazo plej ofte ekster agnoskitaj klerig-institucioj, kiel ekz. la popolaj altlernejoj.

La instruado estas kutime organizata de tiuj, kiuj havas la intereson, ke ekzistu tiuspeca instruado: de la loka E-klubo aŭ de la gelernantoj mem. La instruadon devas do transpreni instruistoj, kiuj kutime ne havas sisteman pedagogian kleriĝon kaj kiuj devas alproprigi siajn konojn per praktika spertado aŭ aŭtodidakte.

La konstato, ke mankas esencaj pedagogiaj konoj, ne estu komprenata kiel subtakso. Engaĝita kaj motivita instruisto kapablas eĉ sen pedagogia teorio pli sukcesan instruadon ol fakulo klerigita pri ĉiuj pedagogiaj teorioj, al kiu mankas la intereso.

Tro granda engaĝiĝo de la instruisto povas esti malutila

Endas koncedi, ke tro forta entuiziasmo flanke de la instruistoj povas esti malhelpa, ĉar ĝi malhelpas ekkoni la motivitecon de la gelernantoj kaj bazi la instruadon sur la interesoj de la gelernantoj. Pro tio ĉi-loke ni kuraĝu starigi la tezon, ke la mankanta sukceso de multaj Eo-kursoj ĝuste klarigeblas per la troa engaĝiĝo de la instruisto.

Dum la instruado de fremdaj lingvoj, la t. n. instruista prelego ĝenerale, se entute, nur okazu cele al klarigo de novaj gramatikaj fenomenoj. Ĉar, kiel konate, E-o disponas pri ekstreme facile strukturita gramatiko, la Eo-instruisto povas plejparte rezigni pri *instruisto-centrita metodo*. (Tio estas instrumetodo,

en kiu ĉefe la instruisto parolas, klarigas, agas.) Ĝuste E-o ebligas instigi la gelernantojn al propra laborado, tiel ke la *instruista prelego* povas malaperi. Instrumetodo, kiu baziĝas eksplicite sur la ideo, ke gelernantoj instruu sin reciproke, estas konata kiel "Metodo Schiffer". Laŭ tiu metodo tiuj, kiuj iom progresis en la lernado, ludu la rolon de instruisto por tiuj, kiuj malpli progresis. Malgraŭ diversaj provoj, diskonigi kaj grandskale apliki tiun metodon, ĝia utiligado ŝajnas esti limigita al la inventanto kaj pro tio devasa esti rigardata kiel variaĵo de la metodoj baziĝantaj sur la ĉeesto de centre rolanta instruisto.

Nuntempe instruista dominado evitendas

La plej malnova de tiuj instrumetodoj estas la unulingva rekta instruado, kiun jam dum la 20-aj jaroj Cseh praktikis kun granda sukceso. Ankaŭ la instrumetodoj, kiujn evoluiigis Claude Gacond aŭ Dirk Andresen, kaj kiuj same aplikitis kun granda sukceso, postulas kiel kondiĉon, ke ĉeestu sperta, lingve lerta kaj memcerta instruanto. Ĝuste tiu antaŭkondiĉo normale ne ekzistas dum la E-o-instruado. Pro tio oni ne povas paroli pri granda disvastiĝo de tiuj metodoj.

La plej grava argumento kontraŭ la instruista dominado, prezentanta sin en la disvastigata *duminstrua komunik-maniero* (nome la interparolo inter instruisto kaj lernanto) estas, ke per tiu instruformo la gelernantoj tro malmulte prepariĝas al la reala, ĉiutaga parolsituacio, en kiu necesas komuniki kun tre diversaj partneroj. La reguleco de E-o devus ebligi, ke ĉiu, kiu certagrade regas E-on, ankaŭ kapablas instrui aliajn pri E-o. Tamen oni ne utiligu kiel mezurilon por la taŭgeco de instrumetodo la kazojn, en kiuj E-o estis instruata en malliberejo aŭ en trajnovagono.

Malalta nivelo de la instrumaterialo

Se oni komparas la elspezojn je materialo kaj komunikiloj, kiujn oni investas en la normalan instruadon de fremdaj lingvoj, precipe en lernejoj, la E-o-instruado sufiĉe modeste aspektas. La malabundeco de materialo parte estas konsiderata kiel metodo: per aparte maldika lernolibro oni intencas emfazi la facilecon de E-o. Sed tio estas miskalkulo. En la plej multaj kazoj la kialo de la modesta aranĝo tamen troviĝas en la manko de financaj rimedoj kaj de teknikaj ebloj. Krom absolute nesufiĉa nivelo je specimeno de litertipoj, grafikaĵoj, komposto, preskvalito kaj bindado ofte ankaŭ mankas ĉia didaktika koncepto.

Pro tio ĉiuj nuntempe aĉeteblaj lernolibroj de E-o havas gravajn mankojn, kio signifas, ke kiun ajn libron oni elektas por porkomencanta kurso, oni estas certagrade limigita. La lasta provo utiligi la evoluojn de pedagogio kaj fremdlingvo-instruado estis *Esperanto programita*, baziĝanta sur la metodo de la programita instruado, kiu hodiaŭ praktike ne plu ludas rolon.

La lernolibro, kiu estas plej evoluinta laŭ la aktuala nivelo de la fremdlingvo-didaktiko, estas la *Taschenlehrbuch Esperanto* de Till Dahlenburg, por kiu ekzistas kroma materialo kaj por kursgvidantoj kaj por aŭtodidakta studado. Kiel lernolibro por FRG ĝi ne estas senprobleme uzebla, ĉar ĝi tro ofte rilatas al la cirkonstancoj en GDR. Krome la kompostado ne estas sufiĉa, kaj la desegnoj – laŭ tio, kion montras praktikaj spertoj – ne estas plaĉaj. Ĉiuj aliaj lernolibroj estas tiom modestaj rilate la aranĝon, ke ili apenaŭ taŭgas kiel ununura bazo por kurso kaj devas esti kompletigitaj per propra materialo.

Kriterioj por lernolibro de E-o

En tiu situacio estas neeviteble krei lernolibron de E-o, kiu evitas la konstateblajn mankojn de la diversaj ekzistantaj lernolibroj, kaj kiu konsideras la kondiĉojn de la nuntempa instruado de E-o. Tio signifas, ke nepre konsiderendas, ke E-o ne estas instruita de formitaj instruistoj, ke la partopreno de la instruo oakzas libervole kaj ke la gelernantoj ne estas infanoj, sed junaj adoltoj.

La plej multaj lernolibroj strebas trakti la kompletan ampleksecon de la lingvo E-o. En la praktika instruado tamen oni nur pritraktas parton, eble duonon de la lernolibro. Ĉu pro tio, ke la tempo disponigita por la kurso finiĝas, ĉu pro tio, ke kelkaj gelernantoj jam sentas sin tiom sekuraj, ke ili povas daŭrigi memstare aŭ plulerni en la praktiko.

Strukturigo de la lernendaĵoj devas esti orientita laŭ praktiko

La konsekvenco de tio estas, ke oni devas disdividi la tutan lingvan amplekson: en bazan kurson kaj en instru-unuojn, kiuj baziĝas sur ĝi. Pro pragmataj kialoj, la baza kurso devas esti limigita tiel, ke eblu instrui ĝin dum 12 duoblaj instruhoroj. Tio estas la kutima daŭro de kursoj en popolaj altlernejoj kaj ĝi ĝenerale montriĝas taŭge superrigardebla tempospaco por kursoj.

Dum la baza kurso konsistas el lecionoj bazitaj unu sur la alia, kiuj estas trakureblaj en fiksa sinsekvo, ne estas necese agi laŭ fiksita sinsekvo, kiam temas pri la progresantaj unuoj.

La enhavo kaj la amplekso de la baza kurso estas determinata de la praktika apliko de E-o. Sub la kondiĉoj de Mezeŭropo tio signifas la utiligon de E-o dum vojaĝoj, ekz. al internaciaj renkontiĝoj kaj kongresoj. Alia okazo por apliki E-on ekzistas pere de *Pasporta Servo*, per kiu oni ĉu kiel gastiganto ĉu kiel

gasto povas kontakti eksterlandanojn. Krome eblas uzi E-on en privata korespondado. Krom tiu aktiva regado de la lingvo oni postulu de la gelernantoj scipovi legi kaj kompreni la Eo-literaturon kaj la movadan gazetaron.

Realigo de tiuj bezonoj en la strukturo de la lernolibro

La skizitaj necesoj, kiuj devenas el la praktika apliko de E-o en la nuna tempo, determinas la aspekton de la lernolibro. Instruante diversajn naciajn lingvojn en la ĝenerale klerigaj lernejoj, oni ekde kelkaj jaroj uzas materialon, kiu korespondu al la cirkonstancoj de la komunikado en la koncerna lando, do ĝi traktu la *komunik-situacion*. Per prezentitaj personoj, al kiuj eblas identiĝi, kiuj havas la tipajn naciajn ecojn kaj kies agoj korespondas al tiuj de la gelernantoj, oni ne nur atingas pli fortan motivigon ĉe la gelernantoj, sed krom la lingvo mem povas peri informojn pri la kulturo kaj vivmaniero.

La problemo estas, ke E-o ne havas nacion kun karakterizaĵoj, kiujn oni povus rigardi kiel tipajn. Supozeblas tamen, ke tipaj karakterizaĵoj ligataj al E-o evoluas kaj iĝas videblaj ĉefe dum internaciaj renkontiĝoj. La taŭga fono de la lernolibro pro tio nur povas esti la situacio de internacia kunveno, dum kiu agas grupo de ne pli ol kvin personoj, kun kiuj la gelernantoj povu identiĝi kaj kiujn ili ŝatu. Tiuj personoj laŭ sekso, raso, okupiĝo kaj aĝo korespondu al la pretendo de E-o esti internacia lingvo, sed aliflanke ebligu, ke la celgrupo identiĝu kun tiu persongrupo.

Estas evitendaj tro foraj, fikciaj kaj abstraktaj situacioj. Ekz. la identiĝeblo kun homigitaj testudoj, troveblaj en la lernolibro *tesi – la testudo*, estas limigitaj al relative junaj gelernantoj. Per la ago de la personoj en la lecionojn ekestas *arko de tensio*, kiu instigas la gelernantojn daŭrigi la kurson por ekscii la solvon kaj pro tio stimulas la plulernadon.

Difino de la lernendaĵoj de la baza kurso

La amplekso de la baza kurso estas determinata per listo de radikoj, afiksoj kaj sufiksoj, kaj tiu parto el la gramatiko, kiu estas konsiderata necesa por majstri la komunik-situacion de internacia renkontiĝo. Rilate al la lernendaj vortoj ne temas pri la vortoj, kiuj estas la plej oftaj en E-o entute, sed ĉefe pri la vortoj, kiuj estas bezonataj en la menciita komunik-situacio.

La baza kurso konsistas el 12 instru-unuoj, kiuj kunmetiĝas el

– tekstoj por la gelernantoj
– labormaterialo por la gelernantoj
– informoj pri gramatiko
– klarigo de vortoj

– aldona materialo por la instruisto
– konsiloj por aŭtodidakta lernado.

Kiel esenca parto estas konsideratajlatekstoj, en kiuj la instruendaĵoj kiel eble plje multe estas prezentataj helpe de desegnoj kaj grafikaĵoj. La labormaterialo servas al tio, ke la gelernantoj estu stimulitaj al aktiva laborado. La materialo instigu al la komunikado kaj pro tio ĝi estu uzas materialon, kiu korespondu al la cirkonstancoj de la komunikado en la sprita, provoka kaj plena je kontrastoj.

Teknika realigo

Pro la limigitaj financaj rimedoj en la unua eldono la lernolibro ne povas aperi en multkolora presado, kiu estas la kutimo por fremdlingvaj lernolibroj. La grafikaĵoj estas limigitaj je simplaj desegnoj. La aranĝo kaj la strukturigo de la paĝoj korespondu pli al la didaktikaj necesoj ol estu orientata laŭ eventuala ŝparado de preskostoj. Se temas pri konvinkite farata lernolibro, estas akceptebla iomete pli alta prezo – des pli, se oni konsideras, ke la unuopaj lernunuoj estas utiligeblaj plurfoje.

La strukturo de la unuopaj lecionoj sekvu la elprovitan skemon de fremdlingvo-instruado en la lernejo: en enkonduka tekstoparto estas prezentataj la novaj lingvaj elementoj. Tiu parto povas esti verkita en formo de dialogo kun disdonitaj roloj. Sekvas ekzercoj, mallongaj rakontoj, enigmoj, lingvaj ludoj, bildopriskriboj ktp. La provizo de formoj por tiuj helpiloj estas granda kaj varia.

Kompletigo per nedevigaj teknikaj komunikiloj

Laŭbezone la lecionoj estas kompletigeblaj per teknikaj komunikiloj. Precipe homoj, kiuj aŭtodidakte lernas, postulas sonkasedojn kun la ĝusta prononcado. Konsiderante la utiligon de teknikaj komunikiloj, oni devas konstati, ke la E-o-instruado plej ofte okazas en kondiĉoj, en kiuj eĉ ne ekzistas nigra tabulo kun kreto. Mankas la ebloj por projekcii foliojn aŭ por montri diapozitivojn, filmojn aŭ videobendojn.

Pro tio la utiligo de teknikaj komunikiloj koncentriĝu je objektoj kiel bildkartoj, vort-kartetoj aŭ similaĵoj. Plej ofte la instruanto sidas kun malgranda rondo de gelernantoj ĉirkaŭ tablo kaj ne staras en lernejece ekipita klasĉambro antaŭ grupo de pli ol dudek gelernantoj.

La apliko de la komunikiloj estas klarigata en la porinstruista kajero, en kiu estas detale pritraktataj la situacioj, en kiuj oni povas avantaĝe utiligi la komu-

nikilojn. Ĉar la instruisto devas aĉeti aŭ produkti la komunikilojn, la kurso devas esti efektivigebla ankaŭ sen kromaj helpiloj.

Evidente, tiu ĉi lernolibro ne povas ekesti kiel genia verko de unusola persono, kiu realigas la tuton de la komenco ĝis la fino. Ĝi devas ekesti en evolua procezo kun diversaj etapoj, kiuj ĉiam permesas kontrolon kaj reverkon laŭ la spertoj el la praktiko. Estas necese produkti partojn kja nekompletajn lernunuojn, kiuj ebligas la testadon en la praktiko. En la unua paŝo estu realigata duono de la baza kurso (6 lecionoj) laŭ la jena laborplano:

1. Difino de la instruendaĵoj kaj lernendaĵoj
– starigo de vortolisto
– elekto de necesaj gramatikaj elementoj
– elekto de afiksoj kaj sufiksoj
– elekto de prepozicioj
2. Skizado de la kadro, en kiu okazas la agado
– priskribo de la roluloj
– koncepto de la historio
– koncepto de la sceno-fono
– grafika realigado
3. Kunordigo de la instruendaĵoj kaj de la agado
– koncepto de la komunik-situacioj
– verkado de ekzerco-tekstoj
– verkado de ekzercaj kaj kontrolaj demandoj
– preparo de la uzado de komunikiloj
4. Produktado de 6 lecionoj
– kunordigo de grafikaĵoj kaj teksto
– aranĝo de la paĝoj
5. Kontrolo en la praktika instruado
6. Analizo de la spertoj
– reviziado de la unuaj 6 lecionoj
– preparo de la dua parto surbaze de la revizio
7. Kontrolo de la kompletiĝo en la praktiko

La celo estas instigi tiujn Eo-parolantojn, kiuj kapablas instrui profesie aŭ estas devigataj amatore instrui, kunmeti la spertojn por krei lernolibron, kiu pruvos, ke la plej facila lingvo fakte estas facile lernebla.

Adreso de la aŭtorino: Maria Merla
assistante d'allemand, Lycée Emile Duclaux
16, Avenue Henri Mondor
F-15005 Aurillac, Francio.

NOVAĴO EL BUDAPEŜTO:

Esperanto-Fako por eksterlandanoj lanĉota en la Universitato Eötvös

INTERNACIA KORESPONDA INTERLINGVISTIKA FAKO komenciĝos la unuan fojon en la studjaro 1990/91 (poste ĉiun trian jaron) en al universitato ELTE, se alvenos sufiĉaj aliĝoj.

La 3-jara postdiploma formado (entute 6 semestroj) intencas doni ĝeneralkaj aplikat-lingvistikajn bazojn por la studado de internacia lingva komunikado, okupiĝas detale pri la problemoj de interlingvistiko kaj pri diversaj terenoj de esperantologio (priskriba gramatiko, literaturo, movad-historio).

La bazaj studobjektoj koncentriĝas en la unuaj du jaroj, la tria jaro ebligos enprofundigon en elektitan fakon (Esperanta gramatiko, Esperanta literaturo, lingvopedagogio [por instruistoj] ĵurnalistiko kaj redaktado de eldonoj, krome komputila lingvistiko laŭ la planoj).

Postuloj por akcepto estas superagrada diplomo (min. bachelor) kaj scio de Esperanto. La kurso komenciĝas per orientiga vizito en septembro 1990, poste po ĉ. unusemajna restado en Budapeŝto dum ĉiu semestrofino por prelegoj, konsultiĝoj kaj ekzamenoj. Tiam la gestudentoj ricevas ankaŭ informojn kaj materialojn por la sekva semestro. Dum la semestro ili devas memstare labori en sia hejmlando surbaze de la disdonita temaro kaj plenumi skribajn taskojn.

Grava diferenco inter ĉi tiu nova studformo kaj la jam ekzistantaj estas, ke studentoj ne devas lerni la hungaran lingvon; la tuta kurso estas donita en Esperanto kaj ne estas devigo preni aliajn fakojn en la Universitato. Fine de la tria jaro, studento devos finpretigi faklaboraĵon aŭ disertacion kaj submetiĝi al superanivela ŝtata ekzameno. Depende de la origina diplomo kaj de la disertacio, eblas akiri diplomon (je grado *Master*) aŭ doktoran gradon (ties limdato estas plilongigebla). Kotizo (laŭ semestroj): 300 dolaroj. Studentoj devas pagi siajn proprajn vojaĝkostojn al kaj de Budapeŝto kaj la loĝigon tie. La Esperanto-fako laŭeble helpos trovi loĝigon de dezirata tipo por studentoj.

ESPERANTO-FAKO POR TAGAJ STUDENTOJ estas ĉiujare ofertata kaj eksterlandanoj rajtas transloĝi al Budapeŝto kaj partopreni ĝin laŭ specialaj aranĝoj, t.e. pli intensa studado ol por enlandaj tagaj studentoj, kaj sen la devigo preni aliajn fakojn, sekve sen la devigo lerni altgrade la hungaran. Kiu jam scipovas Esperanton povas preni postdiploman 2-jaran kurson, aŭ 2,5-jaran se oni ne jam scipovas Esperanton. La formado enkondukas la gestuden-

tojn en diversajn terenojn de interlingvistiko kaj esperantologio (priskriba gramatiko, literaturo, movadhistorio, metodiko).

Enirpostulo estas superagrada diplomo (min. bachelor). La studformo estas partopreno en la lecionoj de la ordinara taga Esperanto-fako (unuajare en ties 3-a jaro kaj duajare paralele en la 4-a kaj 5-a jaroj), plue kompletigaj studhoroj (ĝenerala lingvistiko, enkonduko en la hungarajn kulturon kaj lingvon). Por tiuj, kiuj ne scias Esperanton okazas intensa lingvoinstruado dum la unua semestro.

Rezulto de la studoj estas fine de la dua jaro finpretigo de diplomlaboraĵo kaj ŝtata (kompleksa) ekzameno, cele al akiro de diplomo (grado de *Master*). Kotizo (laŭ semestroj): 1250 dolaroj.

KOMPLETA UNIVERSITATA FORMADO estas proponata ĉiujare en taga kurso por 5-jara superagrada formado, kombinite kun iu alia fako, partopreno en tagaj kursoj kaj lernado de la hungara lingvo. Postuloj estas abiturienta ekzameno kaj la rezulto de la studo fine de la kvina jaro estas preparo de diplomlaboraĵo, ŝtata (kompleksa) ekzameno, kaj akiro de diplomo (je grado *Master*). Kotizo (laŭ semestroj): 1250 dolaroj.

INTERESIĜON, PLIAJN DEMANDOJN KAJ PETON DE ALIĜILO direktu al: Eötvös Universitato, Esperanto-fako, P.f. 107, H-1364 Budapest, Hungario.

ALIĜILOJN sendu al: Eötvös Universitato, Rektori Hivatal Oktatási Osztálya, Szerb u. 21-23. I/28, H-1053 Budapest, Hungario ĝis la 30-a de majo 1990. (Ŝtatanoj de socialismaj landoj aliĝu tra sia koncerna ministerio! Kotizoj laŭ specialaj kondicoj.)

ALIAJ NOVAĴOJ DE LA FAKO

La nombro de la tagaj gestudentoj altiĝis al 30: ĉiuj el tiuj en la prepara kurso en la pasinta jaro definitive elektis la fakon ĉi-jare kaj deko da novuloj estis logitaj al la nova prepara kurso. La programo de eksterlandaj staĝoj por studentoj daŭris tra la jaro.

En junio 1989, 12 pliaj hungaraj gestudentoj finis siajn 3-jarajn postdiplomajn studojn en la enlanda koresponda fako per livero de disertacioj kaj ekzameniĝo. Ekde septembro 10 novaj studentoj certigis la ekfunkciigon de nova 3-jara enlanda koresponda kurso.

Kritika analizo de logika lernoludo

Katalin SMIDÉLIUSZ

En la junia numero de *Budapeŝta Informilo* oni povis informiĝi pri nova instruhelpilo, farita de Imre Bajáki. Mi mem tre ĝojis ekvidinte la anoncon kaj la aldonita foto tuj memorigis min pri la sperta lingvoludilo, per kies prototipo mi jam havis eblecon ekzercigi mian cerbon dum la februaraj pedagogiaj tagoj. Mi tre ŝatas la pensemulojn, tiujn, kiujn ne atendas la bakitan kolombon, kaj pere de memfaritaj instruhelpiloj deziras faciligi la instruadon de Esperanto, riĉigi la mizeran instruhelpilaron de tiu ĉi tereno. Post kelkfoja legado de la iom komplika anonco mi mendis ekzempleron kaj post mallonga tempo mi ricevis ĝin. La ludilo estas 16 x 20 centimetra, simpla, manfarita kaj pro ĝiaj koloraj diskoj sufiĉe atentokapta. Ĝi celas ekzercigi du partojn de la Esperanta gramatiko. La ĉefa parto montras la grandan varieblecon kaj tamen simplecon de la Esperanta vort-farado pere de afiksoj. La alia parto utilas por prezenti la korelativojn. Unue ni esploru la ĉefan parton de la vort-konstruilo. Kvin pli kaj pli grandaj samcentraj radoj kuŝas unu sub la alia. Du el ili surhavas la samajn prefiksojn kaj la aliaj tri la sufiksojn. La diferenco inter la prefiksaj randoj estas nur de grandeco, same inter la sufiksaj. Pere de la helpilo oni povas samtempe uzi 2 prefiksojn kaj 3 sufiksojn por elformi novan vorton. La vortigaj finaĵoj aldonendas per alia randeto. La radikojn, troviĝantajn sur la tabuleto, en elegante kaŝita alumetskatolo, oni devas alfiksi mezen, helpe de du (pikaj!) najlofinaĵetoj. Se la lernanto estas sufiĉe lerta, post pacienca turnado de la randoj li povas elformi derivitan vorton laŭ la sekva mediatoro:

X1 + X1 + R2 + X2 + X2 + X2 + F1

ekz.: re + mal + san + iĝ + em + ul + o

(La uzitaj signoj devenas de profesoro Szerdahelyi)
X1: prefikso
R2: finaĵbezona radiko
X2: sufikso
F1: vortfara finaĵo

Mi tre esperas, ke la elpensinto de tiu ĉi instruhelpilo ne ofendiĝos, se mi aldonas kelkajn menciojn al lia kreaĵo. Mi faras tion publike, ĉar la aparateto jam estas aĉetebla kaj espereble ne nur mi havas ĝin. Povas esti, ke kelkaj kolegoj jam ekis krei pli grandajn versiojn de la vortkonstruilo por utiligi dum la

instruado. Ĝi meritas tion! Espereble miaj bonvolaj rimarkoj plifaciligas la uzadon de la instruhelpilo.

Unue, mi nepre aldonus sur ĉiuj randoj malplenan pozicion, por ke oni komence povu konstrui pli simplajn solvojn. En ĉiutaga lingvaĵo oni ne uzas tiom longajn vortojn kaj eĉ persistaj vortkonstruantoj ankoraŭ ne kapablas elformi ilin. Serĉigu ni unue pli simplajn, ekzemple laŭ tiuj ĉi modeloj:

R2 + X2 + F1
X1 + R2 + F1
X1 + R2 + X2 + F1
R2 + X2 + X2 + F1
X1 + R2 + X2 + X2 + F1 ...

Ĝis nun mi enmanigis la ludilon al ok personoj. El inter ili sep rondirigis la paperdiskojn el dekstra direkto maldekstren. Sekve de tio en la fenestreto la afiksoj aperis male ol oni atendis. Do, la memfabrikantoj kalkulu je la direkto de la propra man-moviĝo!

Miajn studentojn surprizis eĉ tio, ke la sufiksoj troviĝas sur la randoj laŭ la sekva vicordo: AĈ, AD, AĴ, AN, AR, ĈJ, EBL, EC, EG, EM, END, ER, ESTR, ET, ID, IG, IĜ, IL, IN, IND, ING, IST, NJ, UJ, UL, UM, ISM, ANT, INT, ONT, AT, IT, OT, IV, OZ.

Estas ankoraŭ kompreneble, kial la kreinto aparte aldonis la participajn sufiksojn (laŭ PAG 'finaĵoj'), kvankam ĉi-kaze mi ne apartigus tiel ilian funkcion, kaj tute trankvile mi envicigus ilin laŭ la alfabeto. Sed la pozicio de la sufikso *ism* estas nekomprenebla. La vicon finas du el inter la neoficialaj sufiksoj: IV kaj OZ.

Laŭ mia opinio, serĉante la ĝustajn sufiksojn, oni ne pensas pri la menciitaj gramatikaĵoj, oni atendas la sufiksojn tre simple, strikte laŭ la alfabeto.

Nun ni esploru la proponitajn radikojn. La eta skatolo havas entute 42. Laŭ la terminoj de Kalocsay kaj Waringhien:


11 substantivajn: ARB, BEST, EDZ, FRAT, HOM, HUND, KNAB, KOLOR, MON, PAN, PATR.

11 adjektivajn: ALT, BEL, BLANK, BON, DIK, GRAND, JUN, NOV, PLEN, PUR, SAN.

20 verbajn: ATEND, BAN, DORM, ELEKT, ESPER, EST, FAR, FERM, GVID, HAV, HELP, KANT, KIS, LABOR, LERN, LUD, MORT, PAROL, SERV, VID.

La grupigo devenas de mi, do, la ludilo ne distingas la radikojn unu de la aliaj, sekve ĝi aprobas la opinion de profesoro Szerdahelyi, laŭ kiu la finaĵbezonaj radikoj havas nur abstraktan signifon, kiu preciziĝas per aldono de vortigaj finaĵoj aŭ per afiksado.

La logika ludilo ne malhelpas sian uzanton per la klasikaj vortspecoj. Male, ĝi donas vastan terenon por varii la grandnombrajn eblecojn. Estus interese por mi ekscii ion pri la elekto de la donitaj radikoj. Kio motivis la kreinton elekti *kisi* anstataŭ *manĝi* aŭ *skribi*? Ĉu la ofteco de la vortoj, la baza vortostoko, aŭ la variebleco? Mi estas troe obstina por akcepti alies proponojn, do sekvu min la aliaj malimpreseblaj! Ĉiu faru liston de radikoj laŭ propra gusto kaj bezono. Por eviti la eblecon, ke la lernantoj perdu la malgrandajn etikedojn aŭ vundiĝu pro la najloj, mi proponas fari samlarĝajn, pli longajn paperbendojn kun la ekzercigotaj radikoj, denove laŭalfabete. Havante la bendojn, ni povas forigi la skatoleton kaj la najlojn. Se temas jam pri forigo, mi tion farus ankaŭ pri la iom kiĉa ruĝa koreto surgluita sur la tabuleton! La radiklisto estu metita tra la horizontala paperkadro, tra kiu videblas la afiksoj, kaj kompreneble tiel ĝi bezonas meze unu plian eltranĉaĵon por la radikoj. Jen mi imagas la supre pritraktitan ideon:




Pere de tiuj radikbendoj la instruisto havos la eblecon antaŭprogrami la ekzercadon laŭ la lernota materialo kaj disdoni ĉiam la aktualajn bendojn.

Kiu jam havas la logikan ludilon ĉemane, tuj rimarkas, ke sekve de miaj proponoj la alia parto de la tabuleto estos kovrita pere de la radiklisto. Mi opinias, ke oni ne uzas samtempe ambaŭ partojn de la helpilo. Okaze de transformo, oni zorgu, ke la randoj kun la korelativoj troviĝu iom pli malproksime de la mezo.

Ni esploru pli detale la alian parton de la aparateto, kies celo estas ekzercigi la tabelvortojn, eĉ kun iliaj kategoriaj finaĵoj. Ankaŭ ĝi estas utila ideo, sed permesu al mi denove du rimarketojn. Sur la rando de kategoriaj finaĵoj mi nepre farus malplenan pozicion por havi eblecon formi ankaŭ la plej simplajn variantojn, ekz.: KIO, TIU, ĈIAM ktp.

Fine, mi metus kadreton ĉirkaŭ la rezulto-truon, por ke lernanto klare vidu la rezulton sen la ĝeno de la aliaj vortpartoj kaj finaĵoj, jene:



Tio estas simpla psika afero. Dum la perceptado gravas la ĝusta direktigo de la atento. Konkuro de multaj, samtempaj, superfluaj elementoj inter la necesaj kaŭzas interferon, miksadon kaj tio malhelpas la efikecon de la instrua kaj lerna agadoj.

Konklude: la sprita vortkonstruilo de Imre Bajáki meritas nian atenton. Mi kun trankvila koro proponas ĝin al ĉiuj, kiuj instruas aŭ lernas la internacian lingvon. Ĝi utilas por prezenti la novan materialon, ekzercigi kaj ekzerci la vortfaradon kaj pliriĉigi la vortostokon. La multnombraj ekzercotipoj estu temo de alia artikolo!

La iom transformita variaĵo de la logika ludilo meritus financan subtenon, por ke la kreinto grandnombre kaj el pli longdaŭra materialo povu produkti aŭ produktigi ĝin.

GRAMATIKO:

Interesa frazo en la tradukaro de Zamenhof

"Jes, ili brilas", diris Karen (pri la ŝuoj), kaj ili montriĝis laŭmezuraj kaj estis aĉetitaj; sed la maljuna virino ne sciis, ke ili estas ruĝaj, ĉar neniam ŝi permesus al Karen iri al konfirmo kun ruĝaj ŝuoj, sed nun ŝi permesis. (Fab. II, 99).

Jen la dana originalo:

"Ja, de skinne!" sagde Karen; og de passede, og de bleve kjopte; men den gamle Frue vidste ikke af, at de vare rode, thi hun havde aldrig tilladt Karen at gaa til Konfirmation med rode Sko, men det gjorde hun nu."

La frazo estas bona ekzemplo pri la analizo de tradukota frazo, kiun Zamenhof havis antaŭ si. La ĉefa psikologie grava sencoo estas la momentoo, kiam Karen staras tie kun la ŝuoj sur la piedooj, ĝoojplena kaj feliĉa. Ĉio alia estas pasinttempa al tiu momento. La verboj 'diris', 'montriĝis' kaj 'estis aĉetitaj' indikas tri sinsekvajn tempopunktojn. Per la lasta el tiuj tri verboj Zamenhof indikas la faktoon, ke Karen staras kun la ŝuoj sur siaj piedoj post la aĉetado. Sekve li tradukas: "ili estis aĉetitaj". La pluskvamperfekta formo montras pasintan, finitan agon. Alia verboformo ne konvenas, ĉar ne temas pri la momento, kiam okazis la ago mem (ŝi aĉetis), kaj ne temas pri la ago mem (ŝi estis aĉetanta). En la frazo "la maljuna virino ne sciis, ke ili estas ruĝaj" la esprimo 'ne sciis' estas antaŭpasinta al la tuta sceno. La saman uzon de pluskvamperfekto ni trovas en frazo iom antaŭe en la rakonto. "La riĉa ŝuisto en la urbo prenis mezuron por ŝia malgranda piedo. Tio estis farita en lia domo." La esprimo 'estis farita' montras, ke temas pri antaŭpasinteca ago, kaj la verbo 'prenis' en la antaŭa propozicio sekve havas antaŭpasintecan (pluskvamperfektan) signifon (estis preninta). Ke temas pri retrospektiva rigardo al la aĉetado de la ŝuoj, estas substrekita de la lastaj vortoj, "sed nun ŝi permesis", al kiu esprimo la antaŭaj frazoj estas tempe subordigitaj.

Ni havas ĉi tie ekzemplon pri la elasta uzo de la verba paradigmo en Esperanto fare de Zamenhof. La paradigmo facile fleksiĝas laŭ la psikologia enhavo. Ekzemple '-is' povas signifi preteriton, antaŭprezencon kaj pluskvamperfekton. Simile ankaŭ pri 'estis -ita'. Ĝi estas la Esperanta ebleco esprimi la pluskvamperfekton de aliaj lingvoj kiam temas pri tempo. Sed en la ĉi tie analizita frazo ne temas pri tempo sed pri la anima stato de la knabino, do ni havas ekzemplon pri aspekto, nome stato en kiun la knabino estis enkondukita antaŭe.

Odd Tangerud, Norvegio.

RECENZO

INTERLINGUISTICS. Aspects of the Science of Planned Languages, edited by Klaus Schubert in collaboration with Dan Maxwell. Mouton de Gruyter, Berlin-New York, 1989.

La anglalingva studaro, zorge redaktita de Klaus Schubert, aperis en la prestiĝa serio *Trends in Linguistics*. Ĝi meritus pli fakan recenzon ol la jena pritrakto; fakte mi nur hastlegis grandan parton de prunta ekzemplero dum kelkaj tagoj en Nederlando.

Laŭ tradicioj de tiu serio, la libro celas informi ĝeneralan lingvistikan publikon pri la evoluoj de certa sciencokampo, ĉi-foje interlingvistiko. Tial esperantologoj trovos multon jam konatan, kvankam valoregan por „eksteruloj", aliflanke ne mankos novaĵoj kaj interpetoj novaj ankaŭ por ili.

La libro dividiĝas en sep laŭtemajn ĉapitrojn: post la enkonduko de **Martinet**, simpatianta kun E-o, sekvas ampleksa studo (kun abunde orientiga bibliografio) de Schubert pri diversaj interpretoj de „interlingistiko", kiuj ja gamas de la drasta konstato de **Kuznecov** („ne plu estas bezono krei planitajn lingvojn") ĝis idealisma konstruemo de **Verloren van Themaat** („la celo de interlingvistiko estas trovi ne la veron, sed la plej efikan instrumenton al la celo – ĉi-kaze la internacia komunikado"). Plue:

II. *Planitaj lingvoj en lingvistiko* (**Duličenko, Kuznecov, D. Blanke**)
III. *Lingva fasonado kaj lingva ŝanĝiĝo* (**Maxwell, Lo Jacomo, Piron**)
IV. *Sociologio kaj psikologio* (**Pool-Grofman, Piron, Carlevaro**)
V. *Lingvo de literaturo* (**Halvelík, Janton**)
VI. *Gramatiko* (**Daŝgupta, Schubert**)
VII. *Terminologio kaj komputa leksikografio* (**W. Blanke, Eichholz, Sadler**)

El pedagogia vidpunkto plej interesa mi trovis la plej eseecan kontribuon de la volumo, komparon de **Janton** pri tri E-igoj de la 116-a Ŝekspira soneto (tradukoj de Aarse, Auld kaj „nekonato", kiun ni supozas Janton mem). Per elmontro de tri ĉefaj virtoj: klareco, ekonomio kaj fleksebleco de la lingvaĵo, li pruvas la estetikan valoron de E-o al homoj eĉ nenion sciantaj pri la lingvo, helpite de radiklisto kompilita de **Maxwell** por faciligi la komprenon. Je supera instrunivelo tiaj komparoj utilegas por evoluigo de la stilsento (en IPR aperis similtema artikolo de Till **Dahlenburg**).

El komentita statistiko de **Piron** (*Kiuj estas la parolantoj de Eo?*) ni ekscias, ke instruistoj konsistigas ne malpli ol 20 procentojn de la e-istaro! (Do, laŭ eĉ

plej sobraj kalkuloj IPR havas potencialan legantaron de KVINDEK MIL homoj...)

Surprizas (min) eksperimento fare de **Pool** kaj **Grofman** pri *Lingva artefariteco kaj ekkono-kompetenco*. Ili celis esplori, ĉu aŭ ne la rezulto en la solvado de iu problemo dependas de la fakto, en kiu lingvo ĝi estis prezentita al la solvonto (kompreneble, en ideala kazo oni devas supozi egalan konon de la uzitaj lingvoj), kaj speciale, ĉu la artefariteco de unu el la uzitaj lingvoj havas iun rimarkeblan konsekvencon. Eble vi emos ripeti la eksperimenton. Jen la logika problemo, uzita de **Pool-Grofman**, en la angla (kial ne modifi ĝin al via gepatra lingvo?) kaj en Eo:

Every friend of a friend of Country A is a friend of Country A. Every friend of an enemy of Country A is an enemy of Country A. Every enemy of a friend of Country A is an enemy of Country A. Country B is an enemy of a friend of an enemy of Country A. Therefore (choose only the answer that logically follows):

( ) Country B is a friend of Country A.
( ) Country B is an enemy of Country A.
( ) It is not certain whether Country B is a friend or an enemy of Country A.

Ĉiu amiko de amiko de Lando A estas amiko de Lando A. Ĉiu amiko de malamiko de Lando A estas malamiko de Lando A. Ĉiu malamiko de amiko de Lando A estas malamiko de Lando A. Lando B estas malamiko de amiko de malamiko de lando A. Do (elektu nur la logike sekvan respondon):

( ) Lando B estas amiko de Lando A.
( ) Lando B estas malamiko de Lando A.
( ) Ne certas ĉu Lando B estas amiko aŭ malamiko de Lando A.

La ĝustan respondon trovu en sekva numero de IPR... Iel ajn, al kiuj oni prezentis la problemon en la angla, tiuj pli sukcesis ol solvantoj en Esperanto. La aŭtoroj havas tri supozojn por klarigo: pro prestiĝaj kaŭzoj, la respondantoj emis trotaksi sian konon pri E-o; uzo de la angla pli oftas en situacioj, kiuj postulas problem-solvadon ol tiu de E-o; fine kaj plej originale, respondintoj povis havi ideologiajn motivojn, preferon al „amikeco" sendependan de logiko. (Mi aldonu mian supozon pri la efiko de la prefikso „mal": kvankam ĝenerale „mal-vortoj" ne estas malpli elvokivaj ol iliaj sinonimoj, ĉi-kuntekste la torento de apenaŭ distingeblaj „amikoj" kaj „malamikoj" povis kaŭzi rapidan konfuziĝon ĉe la leganto.)

Krome:

ekstravaganca , sed sobre argumentanta **Halvelík** (re)proponas sian teorion pri konsekvenca misformado de Eo por atingi jen arkaikan efikon (Arkaika Esperanto), jen dialektan varianton (Popido), jen slangan impreson (Gavaro). Li plendas, ke ne okazis unueca planado en tiuj kampoj.

Sed ĉu oni povas kaj devas plani tiajojn? Slangon kaj dialekton parolantoj ja certe ne lernos el libro; aliflanke, tradukantoj kaj verkistoj, kiuj fakte bezonas tiujn lingvotavolojn, sentos sian fantazion katenita, se ili devus nepre akcepti la Halvelík-lingvajojn, kiuj en si mem, cetere, sonas interesaj.

Piron esploras, je kiuj konkretaj punktoj E-o evoluis en siaj cent jaroj: li observas i. a. semantikajn ŝanĝiĝojn (la signifoj de ami - ŝati, okazo-kazo), la aŭtonoman uzon de afiksoj (ulo, eta, ktp.), la kreskintan fekundecon de mal- kaj -um- , la aperon de novaj kunmetajoj, la ekeston de slango kaj vulgara lingvajo, tendencon al pli simplaj radikoj (poluo anstataŭ polucio), kaj eĉ malkorektajojn tiajn, kiuj spegulas strukturan modelon tipe E-an („fakultejo" por „fakultato"), ktp. Piron konvinkas per sia kutima vervo pri sia preferata temo: la viva vigleco de E-o, de la „bona lingvo".

Lo Jacomo parolas pri implicaj universalajoj kaj individuaj aspektoj de la signifo; **Schubert** levas validan kritikon pri la vortformada teorio de Kalocsay dirante, ke la distingo de rekta kaj inversa vortefikoj estas nenecesa; **Duličenko** disklasigas planitajn lingvojn laŭ difino kaj funkcio; **D. Blanke** faras simile, establante 19-ŝtupan kategoriaron.

Nemenciitaj aŭtoroj same meritus mencion.

Mi finu per la studo por mi plej revelacia: „Principoj por konstruado de planitaj lingvoj" de **Maxwell**.

La rigore racia prezentado de la principoj, subprincipoj kaj korolarioj havas la avantaĝon de logika sekvebleco; kiu emus kritiki Maxwell, tiu devus zorge preni liajn punktojn unu post la alia. Li konkludas, ke la celo estas krei lingvon, kiu

a, taŭgu por ĉiaspeca homa komunikado

b, minimumigu la ŝarĝon de la lernado

c, dismetu tiun ŝarĝon „demokratie".

Planitaj lingvoj pli respektas punktojn b, kaj c, ol naturaj. Grava malavantaĝo de E-o estas ĝia Eŭrop-centrismo, sed la kreskanta konscio pri tiu eco povos malgrandigi ĝin.

La volumo estus taŭga Kristnaska donaco por niaspecaj librovermoj, sed Kristnasko estos longe pasinta, kiam ĉi tiu numero atingos vin... feliĉan novan jaron!

INFORMOJ, NOTOJ, NOVAJOJ, ALVOKOJ

Informo kaj instruo kune

David RICARDSON: Esperanto – Learning and Using the International Language. Orcas Publishing Company, Box 104, Eastsound, Washington, Usono. *Prezo*: 16.45 usonaj dolaroj ĉe ELNA, P. O. B. 1129, El Cerrito, CA 94530, USA (inkl. sendokostojn).

La libro konsistas el 5 partoj:

1. 71-paĝa traktajo pri ideo, historio kaj nuna stato de E-o;
2. 100-paĝa E-o-kurso kun ekzercoj;
3. 48 tekstoj en E-o sur 129 paĝoj;
4. Bibliografio;
5. Vortaro E-a – angla (5000 vortoj).

Tiu 368-paĝa, malmultekosta libro estas tre rekomendinda ne nur por anglalingvanoj kaj meritas esti tradukita en aliajn lingvojn!

Impresa varbilo

Ekde la 2a januaro 1986 funkcias E-o-varbostampilo en la plej granda aŭstria poŝtejo (A-1150 Wien). 25 milionoj da surpresoj ĉiujare varbas por Eo kaj la Internacia Esperanto-Muzeo en Vieno. Fine de 1989 aperos la CENT-MILIONA surpreso sur iu letero aŭ poŝtkarto. La funkciadon de tiu stampilo pagas privatuloj. Ĝi kostas jare 4400 aŭstriajn ŝilingojn. Se vi volas subteni tiun varbadon, bv. donaci al la aŭstria poŝtĉekkonto 7490.534 de Mag. Walter Klag,Esperanto-Werbestempel.

Ekologiaj rekomendoj

La partoprenantoj de la 25a Brazila Kongreso de Eo, kunvenintaj de la 10-a ĝis la 14-a de julio 1989 por debati la temon „Esperanto kaj ekologio, kiel marŝi duope", proponas,

- ke la e-istoj plejeble uzu priekologiajn temojn en siaj publicajoj;
- ke oni, se eble laŭsisteme, uzu priekologiajn temojn en lernolibroj;
- ke oni instigu al la uzado de tekstoj pri medioprotektado en lernolibroj por la instruado de fremdaj lingvoj kaj por aliaj lernobjektoj;
- ke la e-istoj kunlaboru kun la organizajoj pri medioprotektado por la disvastigo de iliaj ideoj;
- ke la e-aj organizajoj invitu priekologiajn prelegantojn al siaj ejoj kaj invitu siajn anojn al agado por medioprotektado;
- ke la e-istoj klopodu enkonduki E-on en la priekologiajn mediojn por faciligi al iliaj batalantoj la diskonigon de sia agado internaciskala.

Seslingva terminaro

En la kunsido de Tutmonda Esperantista Biblioteka Asocio (TEBA) dum la Brajtona UK estis prezentita la fotokopie havebla verko *Biblioteka Klasifo de Esperanto* de Geoffrey **King** (Britio) kaj *Biblioteka Terminaro*, verkita de redaktoro Portmann (Usono) en kunlaboro kun s-ro Koralo (Ĉinio), kiu partoprenis la kunsi-

don. La terminaro, seslingva, havas 240 dense presitajn paĝojn en formato A5, kaj estas frukto de longa kaj pena laboro. Oni fiksis la prezon je 10 USD. Interesiĝantoj sin turnu al la informinto:*Geoffrey King, 228, Capworth Street, London, Britujo E10 7HL.*

Praktika gvidilo

Aperis tre simpatia libreto Ne tiel, sed ĉi tiel – simplaj sugestoj por agrabla kontakto kun blinduloj" de Herman **van Dyck**, tradukita de J. Koning kaj de Eo-studentoj en la Universitato de Amsterdamo. Ĝi klarigas detale kaj praktike, kun humurplenaj ilustraĵoj, kiel konduti solidare kaj utile kun blinduloj. En Nederlando kontaktu la Nederlandan Blindul-Korporacion (ne-e-ista organizaĵo!): *V. N. B. W, Postbus 2344, NL-3500 GH Utrecht* (eble ili havigos al vi la libreton), por ĝeneralaj informoj la sekretariejon de la Ligo Internacia de Blindaj Esperantistoj (LIBE), *Vgyosz LIBE, Május 1. út 41, H-lO41 Budapest, Hungario.*

Diskonigi la eblecojn

Hungara Esperanto-Asocio eldonis 57-paĝan broŝuron, en la hungara, pri „Lerneja kaj lernej-sistema edukado de Esperanto en Hungario", modele redaktitan de Zsuzsa **Barcsay**. Ĝi detale prezentas la regulojn koncernantajn Eo-instruadon, priskribas ties eblojn je diversaj lernejaj niveloj, provizas argumentojn por la lernado, bibliografias lernolibrojn kaj instruhelpilojn, informas pri uzebloj de la lingvo, revuoj, radi-elsendoj, kontaktindaj institucioj kaj personoj. La celo estis enmanigi konsultmaterialon pri Eo al instruistoj en momento, kiam la rusa ĉesas esti devige instruata objekto en Hungario. La ekzemplo sekvindas.

Universitata eldonaĵo

Alvenis en la redakcion la 4a n-ro de *Mondo de Universitato*, daŭre plaĉa kaj dulingva periodaĵo el la korea Dankook-Universitato, pri kies historio ni interalie sciiĝas el la revuo. Legeblas raporto pri „Ĝemeliĝo per E-o de Dankook Universiato kaj Budapeŝta Teknika Universitato" en februaro 1989. Ni bedaŭras,ke forestas mencio pri la samokaze realiĝinta persona kontakto inter la Dankook-aj reprezentantoj kaj la E-o-fako de Universitato ELTE en Budapeŝto. Redakcia adreso: *8 Hannam-dong, Seoul-140-714, Koreujo*

Trilingva informilo

La nova monata informilo *Sovetia esperantisto* raportas sur siaj 4 grandformataj, koloraj paĝoj pri la evoluoj de la soveta movado – kaj pri la celoj kaj agado de ILEI en sia februara nro. Aparte atentindas, ke la revueto aperas ne en Moskvo, sed en Baku: konforme, ĉiuj informoj apudas en la lingvoj azerbajĝana, rusa kaj Eo. Redaktoro **Mammadov** „supozas, ke burokrataj baroj por fremdlanda abonoj ne okazos. Estus bone, se internaciaj kaj naciaj E-organizaĵoj povus almenaŭ proksimuime kalkuli dezirantojn aboni SE kj sendi al la redakcio garanti-leterojn. La prezo de jarabono por landoj de Konsilio de Ekonomia Interhelpo (*dum kaj se ĝi ankoraŭ ekzistas... – la red.*) estas 11 rubloj, por ceteraj proks. 22 rubloj laŭ ekzistanta valutkurzo." Kontaktu *370146-SU, Baky-146, a/k 3.*

Gepatra ligilo

Trafis nin *Cirkulaĵo por esperantlingvaj paroj kaj familioj*, kiu represas leterojn kaj informojn koncerne denaskan edukadon, enfamilian Eo-vivon ks. Ni reliefigu la alvokon, ke kolektadon de infan-poemetoj kaj -rimaĵoj pluzorgas *Ferenc Hegedüs, Bánki D. u. 59. II/3, H-2840 Oroszlány, Hungario*. Interesas la propono „lanĉi tradukadon el naciaj lingvoj de plej indaj porinfanaj libroj kaj kolekti la tradukaĵojn sur disketoj de komputiloj", ĉar laŭ la opinio de A. Gofen el Moskvo (kaj ni same pensas) mankas interesa, taŭga kaj lingve senriproĉa aro de infan-klasikaĵoj en E-o. Kiu volas ricevi la cirkulaĵon, kaj/aŭ kunlabori en ĝia laboro, skribu al: Renato Corsetti/Anna Lowenstein, Colle Rasto, I-00039 Zagarolo, Italio.

Lodza prelegaro eldonita

Eldoniĝis kiel 89-paĝa libro la materialoj de la 21-a konferenco de ILEI en Lodzo en 1987, kun la titolo *El teorio kaj praktiko de Esperanto-instruado*, sub la redakto de nia pola sekciestro Tadeusz **Ejsmont**. Post la enkonduka protokolo aperas 12 kontribuoj, i. a. „E-o kiel propedeŭtika lingvo" de Maria Majerczak, „Internaciaj vortoj en Eo, ĉu balasto aŭ propedeŭtika utilaĵo" de Till Dahlenburg, „Funkci-karaktera lingvoinstruado" de Zsuzsa Barcsay, „Kiel instrui por eviti interlingvan interferencon" de Irena Szanser.

Nova infana kurso:

Esperanto por ni



Jen sistema lernilo por infanoj inter la aĝoj de 8 kaj 12. Per abundaj bildoj serio de kvar libroj prezentas la bazon de Esperanto per nur Esperanto kaj prezentas multajn aktivigajn ekzercojn. Verkis Jozefo kaj Helena Mikulás.

Jam uzata en oficialaj element-lernejaj klasoj, ĝi proponas tre utilan materialon en la manoj de spertaj instruistoj. 4 volumoj kun entute 264 paĝoj. Koloraj allogaj kovriloj. Ĉiu volumo kostas 45 forintojn de Hungara Esperanto-Asocio (pf. 193, H-1368 Budapest) aŭ 9,90 gld. de UEA.

ILEI LABORTABLE

Sekretario de ILEI

Ni bedaŭras anonci la malsaniĝon de la sekretario de ILEI, s-ino Audrey Childs-Mee, tiel ke ŝi dum kelkaj monatoj ne povos plenumi la oficon. Membroj bonvolu direkti ĉiujn demandojn, petojn ks. al nia vic-sekretario, Malcolm Jones, 41 Causeway, Chippenham, Britujo, SN15 3DD; tel. (0249) 656041. Memoru, ke la estraro kunvenos en Budapeŝto inter la 22a kaj 24a de februaro 1990. Se membro volas fari proponon, levi temon pri iu aspekto de la agado, bv. kontakti Malcolm kiel eble plej baldaŭ.

Vic-prezidanto reeniras la mondon

Nia vic-prezidanto, Stefan MacGill, anoncas la akiron de hejma telefono, kio povos rapidigi estraran kaj ligan laboron konsiderinde. El eksterlando: + + 36 1 1832-207.

Ekzamenoj supere

Dum tiu kunsido la estraro diskutos nun studatan labor-dokumenton pri la formo kaj enhavo de la superaj ekzamenoj de UEA/ILEI. El tiuj diskutoj kaj tiu plur-ebleca dokumento devos rezulti unu propono por regularo proponebla al nia membraro kaj UEA. Se iu volas fari proponojn por eniri la februarajn diskutojn, bonvolu nun skribi al d-ro Till Dahlenburg, Str. der DSF 13, DDR-2722 Brüell, Germana DR.

Konferencu Karibe kun kolegoj

Kubo alvokas vin; ne maltrafu la unuan ekstereŭropan konferencon de ILEI! La varbilo kaj aliĝilo en la antaŭa numero de IPR donas plenajn detalojn. Ne prokrastu la aliĝon! Frua anoncado helpos nin en la planado. Ni havos gravajn diskutendaĵojn, pri ekzamenoj, lerniloj kaj entute pri la tutmondigo de niaj pedagogiaj streboj. Ni malkovros tie tute novan mondon de Esperanto-instruado kaj povos establi valorajn kontaktojn. Inter la karavanaj flugoj proponataj de UEA kaj aliaj asocioj certe troviĝos datoj, kiuj konvenos al partopreno de nia konferenco. Ne forgesu, ke rekta aŭtobusa transporto estas proponata el kaj al Havano antaŭ kaj post la konferenco.

Membraro

Nia kasisto raportas, ke la membraro de la Ligo por 1989 atingis 704, kiu prezentas modestan kreskon kompare kun la ĵusaj jaroj, sed ne kompare al pli frue. Por 1990 estas nepre necese akceli tiun resupreniron. Bonvolu helpi nin varbi novajn instruistojn, fondi novajn sekciojn, kie ili ne ekzistas, kaj akiri reprezentantojn en landoj neatingitaj ankoraŭ. Sekciestroj bonvolu fari specialajn penojn altigi la membronombron por 1990, tiel donante pli firman bazon por nia agado. La unua numero de *IPR* por 1990 estas en preparo, tiel ke ĝi aperu tuj post la februara estrarkunsido kaj portu freŝajn novaĵojn de ĝi.

Rekotizu frue por 1990 kaj subtenu vian Ligon!

HONORAJ MEMBROJ

Peter Zlatnar (YU, 1984) – Mario Dazzini (I, 1985) – Erbetta Marcel (CH, 1986)
Irja Klemola (SF, 1986) – Olle Olsson (S, 1986) – Jozef Toczyński (PL, 1986)
Helmut Sonnabend (D, 1987) – Catina Dazzini (I, 1988) – Szerdahelyi István (H, 1988)
M.H. Saheb-Zamani (IR, 1989)

SEKCIESTROJ DE LA LIGO

Argentino	: Alfredo Juan Valle, Santa Fé 497, RA-1708 Morón (B.A.)
Aŭstrio	: Mag. Walter Klag, Rudolfinergasse 8/11, A-1190 Wien
Belgio	: Marc Demonty, Schoolstraat 3, B-1710 Dilbeek
Brazilo	: Elvira Fontes, Rua Machado de Assis 243, ap. 11, BR-04106 São Paulo SP
Britio	: Arnold Pitt, Yew Tree Cottage, Ivington Road, Leominster, Herefordshire HR6 82D
Ĉeĥio	: Vêra Barandovska, Volgogradská 41, CS-70400 Ostrava 3
Ĉinio	: Zhang Danchen, General Foreign Languages Dept., Huazhong Normal University, 430070 Wuhan, PR China
Estonio	: Palu Johannes, Solme 21, SU-200016 Tallinn, Estonio
Finnlando	: Mia Alikosti, Mustainvelj.kuja 3A1, SF-20700 Turku
Francio	: Claude Nourmont-Moon, 2 Om Kläppchen, L-5682 Dalheim
F.R. Germanio	: Stefanie Tucker, Alatseestr. 14, D-8900 Augsburg
Germana D.R.	: Till-Dietrich Dahlenburg, Str. der DSF 13, DDR-2722 Brüel
Hispanio	: Manuel López Hernández, Sol 75, E-41003 Sevilla
Hungario	: Márta Kovács, Ady E. u. 23-25/C, H-1221 Budapest
Israelo	: Murĵan Josef, P.K. 1289, IL-61012 Tel-Aviv
Italio	: Catina Dazzini, C.P. 22, I-54100 Massa
Japanio	: Toi Kunio, 1448-1 Simotakajyanagi, Kazo-si, Saitama 347
Jugoslavio	: Sonja Tavčar, Liminijanska 6, YU-66320 Porotorož
Korea Resp.	: Gilsu So, Sodaemun, P.K. 59, Seoul-120
Nederlando	: D. Luesken-Burger, Renderklippenweg 5, NL-8162 NC Epe
Nordameriko	: Ian Richmond, 66 Naomee Cres., London, Ont. Canada N6H 3TS
Norvegio	: Åge Melå, Beverstien 2, N-3190 Horten
Pollando	: Tadeusz Ejsmont, ul. B. Bartoka 1 m 49, PL-92 547 Lódź
Portugalio	: Alexandre Kasesa, Rua Actriz Palmira Bastos 10, 4'B, P-1900 Lisboa
Sanmarino	: Marina Michelotti, Contrada del Collegio 51, I-43031 San Marino
Slovakio	: Růzena Vojtechová, Bytovky blok "B", CS-05960 Tatavanská Lomnica
Sud-Afriko	: Japie Spoelstra, Posbus 20185, Noordbrug 2522, Suid-Afrika
Svedio	: Bertil Andreasson, Södra Rörum pl. 455, S-24294 Hörby
Svislando	: Edgar Jobin, F.W. Dubois 11, CH-2400 Le Locle
Venezuelo	: J.E. Bachrich, Apartado 3833, YV-1010 A Caracas
Zairio	: Ngangu Nduantoni-Bakidila, B.P. 13, Lukala (Bas-Zaïre)

REPREZENTANTOJ

Bangladeŝo	: Sultan Ahamad, Factory Inspection Dept., 4 D.I.T. Avenue, Dhaka-1000
Centrafrika Resp.	: Luc Feidangai, B.P.960, Bangui
Ĉilio	: Luis A. Vera, Isabel Riquelme 7115, Pobl. C. Estrella, La Cisterna, Santiago
Irano	: Mohammad Karamudini, P.O.Box 13445-747, Tehran/Iran
Niĝerio	: Godwin Oboh, University of Ekpoma Wan, Illeh Box 62, Ekpoma Bendel
Tanzanio	: Mramba Simba, S.L.P. 1051, Bunda Mara

LABORKOMISIONOJ

Statistiko	: Germain Pirlot, Kemmelbergstraat 5, b. 3, B-8400 Oostende
Didaktikaj lud(il)oj	: Georges Sossois, rue de la Consolation 2, B-6400 Couvin

KUNLABORANTAJ INSTITUCIOJ

UNESKO	: (Rilatoj de reciproka informado, Kategorio C) : 7 Place Fontenoy, F-75007 Paris. Reprezentantoj de ILEI: James Fairbank, 6 Avenue Th. Rousseau, F-75016 Paris François Lo Jacomo, 21 rue Juliette Dodu, F-75010 Paris
UEA	: Universala Esperanto-Asocio, Nieuwe Binnenweg 176, NL-3015 BJ Rotterdam
IEI	: Internacia Esperanto-Instituto, Riouwstraat 172, NL-2585 HW Den Haag
KCE	: Kultura Centro Esperantista, BP 779, CH-2301 La Chaux-de-Fonds

Kontribuaĵoj al IPR

tajpitaj kuń duobla interspaco kaj marĝenoj, al la adreso de la Redaktejo (vd. kovrilpaĝon)

Abonado al IPR kaj membriĝo al ILEI:

(membrokotizo 40 Svedaj Kronoj)

1) poŝtĝirkonto: 682117-7 (Stockholm). «La Internacia Ligo de Esperantistaj Instruistoj» (ILEI). Södra Rörum pl. 455, S-242 94 Hörby (Svedio).
2) poŝtĝirkonto: 3789 64 — ILEK-A — de UEA, Nieuwe Binnenweg 176, NL-3015 BJ Rotterdam (Nederlando), por la interna konto ILEK-A de ILEI.